

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



**Brazauskas:
Amiko de Esperanto**



**Fröhlich:
Sinjoro Eŭropo
Bjalistoko revekiĝas
Lingvopolitiko:
ĉu bezonata?**

Enhavo

- 81 Estraro de UEA: Glataj ŝanĝoj, efikaj aranĝoj (István Ertl)
- 82 Esperanto bone vendiĝis en Litovio (István Ertl)
- 84 Junularo: Gejunulojn plu altiras idealoj (intervjuo kun Ralf Gion Fröhlich, prezidanto de Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizoj)
- 85 Fondumo Zamenhof: Bjalistoko ne plu silentas (Roman Dobrzyński)
- 86 Esperanto en radio: Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (OSIEK-AERA); Lobiu por Esperanto en radio (Bruno Masala)
- 87 Fakaj asocioj: Katolikoj kontribuas al la ekumena elano (intervjuo kun d-ro Antonio De Salvo, IKUE-prezidanto)
- 88 Akademio de Esperanto: Ne izolita, elita Akademio (Amri Wandel)
- 89 Lingvo: Ĉu ni bezonas lingvopolitikon? (Detlev Blanke); Umberto Eco ree pri Esperanto
- 91 Kongresa komunikado 3 de la 81-a Universala Kongreso en Prago
- 92 Instruado: Viktorio EKPAROLIs (Jennifer Bishop)
- 93 Recenzoj: *Un privé dans la nuit* (Stefan MacGill); *Mil unuaj vortoj en Esperanto* (Howard R. Berman); *La interna vivo de Esperanto* (Miguel Fernández); *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj* (Werner Bormann)
- 95 Laste aperis
- 96 Forumo: Preparu manĝon ankaŭ por alia (Öşhó-Davies Olúwábùnmí); La deksepa regulo (Alberto García Fumero)
- 97 Loke – Persone – Fake
- 99 La ĉemizoj de Paĉjo Kristnasko (intervjuo kun Amarílio Hevia de Carvalho, ĉemizisto)
Anoncetoj
- 100 Nekrologoj; Oficiala informilo

Vi trovas

prezidenton, prezidantojn kaj prezidinton (kaj sendube, ankaŭ prezidontojn) sur la sekvaj paĝoj. Vi legos pri la ĵusa vizito de la prezidanto de UEA, LEE Chong-Yeong, al Litovio, kie li renkontis i.a. la prezidenton de la lando, Algirdas Brazauskas (p. 82-83). Du novbakitajn prezidantojn esperantistajn ni intervjuis: Ralf Gion Fröhlich estras Eŭropan Kunordigan Buroon de Internaciaj Junularaj Organizoj (p. 84), kaj d-ro Antonio De Salvo transprenis la gvidadon de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (p. 87). Prezidinto de Fondumo Zamenhof, Roman Dobrzyński raportas pri revigliĝo de la planoj pri E-centro en Bjalistoko (p. 85).

Sed nia revuo temas ankaŭ — kaj precipe — pri neprezidantoj: pri “la diligenta kolego” kiu esprimas siajn opiniojn Forume (p. 96), aŭskultas E-elsendojn kaj leteroj al radiostacioj (p. 86), vizitas UK-on (p. 91), aĉetas librojn kaj vidbendojn en Esperanto (p. 95), kaj estos eble la 5047-a abonanto de ĉi tiu revuo (p. 81) ...

La kovrilo: Algirdas Brazauskas, prezidento de Litovio (maldekstre), kun LEE Chong-Yeong.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofinio: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anoncarifoj (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐ keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario (strategia planado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282 [of/h]; ✉+1-613-565-9279 [of/h]; ☐mfettes@magi.com.

Estraro (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-5284-1214 [h], +31-50-613769 [of]; ✉+31-50-613763 [of]; ☐a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉+370-7-204970 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO): s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98 [h]; ✉+39-6-39-72-61-69 [h]; ☐mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.

Glataj ŝanĝoj, efikaj aranĝoj

La klopodon de la nuna Estraro je efikeco kaj ŝparemo montras ke la kunsidoj, antaŭe dismetitaj al tri tagoj, ĉi-foje — same kiel jam en aŭtuno — enteniĝis en dek ses horoj de du semajnfinaĵ tagoj (30-31 marto).

Difinante kunven-daton koincidan kun tempo-ŝtela horŝanĝo, la estraranoj malfaciligis sian taskon. Helpis tamen grandaj kvantoj da kafo, teo, kaj ginsenga infuzaĵo alportita de LEE Chong-Yeong. Kuntrinkis kaj kunsidis la kompleta estraro, la observantoj (ILEI-sekretario Marija Beloŝević kaj TEJO-prezidanto Danny ten Haaf), kaj CO-oficistoj.

La Estraro konstatis ke, malgraŭ la escepte granda laborpremo sur la Centra Oficejo en la lastaj monatoj (i.a. pro la februara adiaŭo de la duontempa librotenistino Ina van der Krans kaj pro malpliaj laborhoroj de ekspedisto-provlegisto Rob Moerbeek), glate okazis la jam anoncitaj interŝanĝoj ĉe tri postenoj: de januaro Osmo Buller funkcias kiel ĝenerala direktoro de UEA, Pasquale Zapelli kiel direktoro de la CO, kaj Simo Milojević kiel libroservisto.

Laŭ la nova Regularo pri Delegitoj, akceptita en Tampere, ĉiuj delegitoj kiuj volis re-kandidatiĝi por 1996-98, devis plenumi respondilon. Ĝis nun reagis 83% el ili — preskaŭ 1800, kies nomojn enhavos la Jarlibro 1996, aperonta en majo. Pri tiel bona rezulto la Estraro tre kontentis. Post la akcepto de la nova regularo pesimistoj ja aŭguris ke la delegita reto ŝrumpas ĝis duono. Cetere, ankaŭ al la ĉefdelegitoj aplikiĝas la regulo pri 3-jara oficperiodo. En tiu ĉi kunsido estis nomumitaj 40 ĉefdelegitoj, kio signifas ke ankoraŭ ne ĉiuj landaj asocioj faris tiurilatan proponon al UEA.

Malgraŭ plibonigoj, la revuo *Esperanto* en 1995 sukcesis nur gardi sian abonantaron, ne altiĝi ĝin (5045 en 1994, 5046 en la pasinta jaro). Tamen, ĝi povus realisme celi plian milon da abonantoj. Ĉar nuntempe prokrastoj

en ĝia pretigo senutile ŝarĝas la Grafikan Fakon, la Estraro avertis la redaktoron severe respekti siajn limdatojn.

Lige al la evoluo de la membraro pasintjare, oni salutis elstaran kreskon (44%) en Brazilo, kaj halton de la falo en Orienta Eŭropo (krom en Slovakio, kie malfondiĝis la landa asocio). Tamen, en ĉi tiu landaro pluraj kotizperantoj funkcias plu neefike; oni esperas plibonigon pro la eblo nomumi pli ol unu peranton por unu lando.



Prezidanto LEE Chong-Yeong traktas kun la direktoro de la Centra Oficejo, Pasquale Zapelli (maldekstre) kaj la ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller (dekstre).

Nekutime malmulte da tempo oni devis dediĉi al financaj aferoj: parte pro neoficiala kunsido — pli precize kurso — pri la financa vivo de UEA, okazinta antaŭ la oficiala kunsido, sed precipe pro la relative bona stato de la spezoj de UEA. Por 1995 la buĝeto antaŭvidis negativan saldon de 30 475 gld. Kiam ĉiuj kalkuloj estos pretaj, la rezulto estos verŝajne pli bona, malgraŭ ke oni apartigis 5000 gld. por la pensioj de la oficistoj kaj deskribis 6500 gld. de la stokoj de la Libroservo kaj Eldona Fakoj. Neniun el tiuj du elspezoj oni kuraĝis antaŭvidi kiam oni decidis pri la buĝeto de 1995. Por 1997, la Estraro proponas moderan altigon de la baza membrototizo (t.e. Membro-Abonanto laŭ la tarifo por Nederlando), de la nunaj 97 gld. al 100 gld. Laŭ komerca pensado, ĝi ja devus esti 99,90 gld., sed la tri-cifera

“prez-etikedo” espereble ne montriĝos psikologia baro! La buĝetpropono por 1997 finiĝas per negativa saldo de 20 000 gld. La malkresko de defcito do daŭros eĉ en jaro kiam la UK verŝajne donos licencpagon malpli ol averaĝan al la kaso de UEA.

La Estraro starigis komisionon pri Interreto, kies membroj (Axel Belinfante kaj Derk Ederveen el Nederlando, Martin Weichert el Svedio, prizorgantoj de la UEA-hejmpaĝo en la Tut-

Tera Teksaĵo) konsilos pri ties efika uzado. En la lasta tempo ja rapide kreskas la komputila mesaĝaro traktata en la CO, enhavanta mendojn kaj informpetojn — eĉ de malnovaj E-lernintoj kiuj remalkovras la ekziston de E-o dank’ al la komputila reto!

Mark Fettes mal-kontentis pri sia propra neplenumo de pluraj taskoj, precipe la ellaboro de rekomendoj por Strategia Plano kaj por Laborplano 1996-99. Tion kaŭzis ĉefe lia granda aktivado, apoge al LEE Chong-Yeong, pri eksteraj rilatoj. Fettes ankaŭ redaktas novan interlingvistikan rubrikon en la prestiĝa revuo *Language Problems and Language Planning*. Li pretus rezigni pri parto de siaj respondecoj, sed la Estraro petis lin gardi la samajn taskojn dum almenaŭ plia jaro.

Post ĵusa vizito de Osmo Buller al Francio, kiu konfirmis la bonajn kondiĉojn kaj urbestran apogon por UK en Montpeliero, la Estraro decidis ke la 83-a Universala Kongreso (1998) okazu en tiu urbo de Suda Francio. Por la antaŭa UK (Adelajdo, Aŭstralio, 19-26 julio 1997) validos specialaj aliĝ-periodoj (vd. p. 91). Por 1999 invitas Berlino kaj Tel-Avivo. Pri diversaj pluaj jaroj interesiĝas almenaŭ Braziljo, Budapeŝto kaj Flandrio.

István Ertl

Esperanto bone vendiĝis

Post la estrar-kunsido, LEE Chong-Yeong flugis la 1-an de aprilo al Litovio, kie, helpate de estrarano Povilas Jegorovas, li “vendis Esperanton” al ŝtatprezidanto Algirdas Brazauskas, al ministroj kaj aliaj litovaj eminentuloj.

Dum siaj oficialaj vizitoj, LEE Chong-Yeong kutimas prezenti du vizitkartojn: sian nomkarton de universitata profesoro de merkato (‘‘pro ĉi tiu mi enspezas’’) kaj sian karton de UEA-prezidanto (‘‘pro ĉi tiu mi elspezas’’). Post tia prezentiĝo ne surprizas lia anonco: ‘‘mi estas ĉi tie por vendi al vi Esperanton’’, kaj nature sekvas ke la kunparolantoj, je la fino, deklaras sian simpatian al la ideo de Esperanto. Dum sia programdensa tritaga restado (1-3 apr.), reĝisorata de la litova estrarano Povilas Jegorovas kaj subvenciata de loka banko, Lee havis multajn okazojn transdoni nomkartojn — oni povus diri, la nomkartojn de nia movado. Ĉiuj interparoloj okazis en la litova, kun profesieca Esperanta interpretado de Jegorovas.

Logike, la vico de vizitoj komenciĝis ĉe kultur-ministro Juozas Nekrošius, fama litova poeto. Je lia demando pri Esperanta kulturo, Lee klarigis kiel la diverseco de kulturaj fonoj fundamentas la kulturon Esperantan, tamen unuecan. Nekrošius promesis esplori pri la ebloj eldoni E-lernolibron kaj sendi litovan ensemblon por la kultura programo de la Praga UK, en kiu eventuale ankaŭ li mem faros prelegon. La interparolon partoprenis Jegorovas kaj Algimantas Piliponis, kiu estas estrarano de Litova E-Asocio (LEA) kaj direktoro de teknika lernejo en Vilnius.

Propedeŭtika eksperimento

En konversacio kun la ministro pri edukado kaj scienco, prof. d-ro Vladislavas Domarkas, kaj lia departement-estrino pri edukado, Loreta Žadeikaitė, temis pri eksperimento por pruvi la propedeŭtikan valoron de Esperanto por lernado de aliaj lingvoj. Ekde la instruaro 1996/97du eksperimentaj grupoj lernas Esperanton, poste la anglan resp. la francan, kaj du kontrolgrupoj nur la lastajn du lingvojn, sen Esperanta preparo. La ministro principe akceptis la proponon, kaj LEA pretigas konkretan projekt-dokumenton. Ĉi tie la esperantista delegacio konsistis el d-ro Arimantas Račkauskas, vicprezidanto de LEA, eksurbestro de Kaunas kaj vicdirektoro de banko; Zenonas Sabalys, LEA-aktivulo kaj bankprezidanto; Algimantas Piliponis; kaj prof. d-ro Aloyzas Gudavičius, LEA-vicprezidanto kaj rektoro de pedagogia instituto en Šiauliai.

La laboran parton de la unua tago kompletigis renkontiĝo kun sep anoj de la litovia parlamento, plejparte membroj de ties komisiono pri eksteraj rilatoj: inter ili, prof. d-ro Mečislovas Treinys (Litova Nacia Unio) kaj Antanas Račas (Litova Konservativa Partio) estas esperantistoj kaj parte parolis en Esperanto. (Du aliaj deputitoj samideanoj ne povis ĉeesti pro aliaj okupoj.) Ĉe la espe-



En la prezidenta laborĉambro, de maldekstre: Arvydas Matulionis, Zenonas Sabalys, Povilas Jegorovas, prezidento Algirdas Brazauskas, LEE Chong-Yeong, Algimantas Piliponis

rantista flanko de la tablo sidis Lee, Jegorovas, Račkauskas kaj Sabalys. La parlamentanoj konsentis pri la neceso de politika subteno por Esperanto kaj opiniis ke, okaze de la atendata aliĝo de Litovio al Eŭropa Unio, la lingva demando neeviteble spronos viglajn debatojn. Respondante al deputito kiu volis scii ĉu UEA kunlaboras kun Transnacia Radikala Partio, Lee rekonfirmis ke UEA pretas kunagi por siaj celoj — sen politika sinengaĝo — kun ĉiu organizo kiu subtenas tiujn celojn.

Vespere, Lee renkontis ĉ. 30 esperantistojn en Vilnius.

Ĉe la litova prezidento

En la mateno de la dua tago, la prezidento de Litovio, Algirdas Brazauskas, akceptis en sia laborĉambro delegacion de Lee, Jegorovas, Piliponis kaj Sabalys. En malstreĉa konversacio, Brazauskas agnoskis ke Litovio spertas seriozajn lingvajn problemojn lige kun sia EU-aliĝpreparo, opiniis ke la uzo de E-o en Eŭropa Unio estas aprobinda, kaj ricevis informojn pri la planata propedeŭtika eksperimento. Laŭ propono de Lee, li akceptis ‘‘kun plezuro’’ fariĝi ‘‘amiko de Esperanto’’. La interparolon ĉeestis konsilanto de la prezidento, prof. d-ro Arvydas Matulionis, kaj la gazetara respondeculino de Brazauskas, Lidija Šabajevaitė. La nacia televido plurfoje dissendis raporton pri la renkontiĝo kaj la intervjuon kiun Lee donis post ĝi.

La sama kvarkapa delegacio iris poste al la vicprezidanto de la litovia parlamento, Juozas Bernatoniŝ, kiu anstataŭis

s en Litovio



la forestantan parlamentestron. La interparolo koncernis lingvajn problemojn en internaciaj rilatoj. Laŭ la politikisto, parlamentanoj ĉiam havas pli malferman sintenon al novigaj proponoj ol burokratoj de administracioj; tial oni levu la lingvan demandon unue en interparlamentaj organizoj, en kiuj, cetere, reprezentantoj de malgrandaj ŝtatoj pli decide rolas ol en aliaj forumoj. (Interese noti la koincidon ke la prezidanto de la franca senato, René Monory, traktis en la sama tago kun parte la samaj eminentuloj kiel LEE Chong-Yeong.) Bernatonis esprimis timon ke la malgranda litova lingvo estas minacata de la grandaj lingvoj internacie uzataj; Lee respondis ke E-o, ebliganta egalrangan komunikadon inter diverslingvanoj, rolas kiel ŝirmilo por minacataj idiomoj. Fine, Bernatonis promesis laŭbezonan helpon al LEA.

Al Lee, Jegorovas kaj Piliponis aliĝis LEA-sekretariino Irena Alijoŝiūtė kaj Algimantas Skūpas, LEA-prezidinto kaj profesoro ĉe la universitato de Vilnius, por viziti ĉi ties rektoron, prof. d-ron Rolandas Pavilionis. Laŭ propono de Lee, la rektoro promesis enkonduki E-instruadon ekde septembro, zorge de prof. Skūpas. Inter la libroj donacitaj al Pavilionis estis *Le défi des langues* ("La defio de la lingvoj") de Claude Piron, kiun la rektoro transdonos al la universitata biblioteko post propra trastudo.

Posttagmeze Lee, Jegorovas kaj Alijoŝiūtė veturis al Kaunas, la urbo kie staras Esperanto-domo, sidejo de LEA. Kun akompano de la esperantista eksurbestro Račkauskas ili vizitis la urbo-

domon, kie, pro foresto de la urbestro, akceptis ilin administranto Kazimieras Starkevičius. En amika interparolo, li konfirmis ke LEA plu ĝuos ĉiuf flankan subtenon de la urbo. Por fini la tagon, Lee renkontis antaŭ kameraoj de loka televido ĉ. 70 lokajn esperantistojn, kiujn li kuraĝigis rekomendi E-instruadon en lernejoj kun la argumento ke la edukministro konsentas pri propedeŭtika eksperimento kaj ke prezidento Brazauskas estas "amiko de Esperanto".

Dank' al pli frue ricevita gazetara dosiero pri UEA, LEA kaj Lee, la litovaj amaskomunikiloj vaste raportis pri la vizito, kelkaj eĉ plurfoje. La nacia inform-agentejo ELTA kaj la novaĵoj radiaj kaj televidaj aparte substrekis ke prezidento Brazauskas akceptis esti "amiko de Esperanto".

Varsovio: Pola Radio kaj Daewoo

De Vilnius, Lee flugis al Varsovio la 4-an de aprilo, kaj "vendadis" Esperanton laŭ tagplano aranĝita de Andrzej Pettyn. Lee parolis kun d-ro Stanisław Jędrzejewski, vicprezidanto de Pola Radio, laŭ kiu Pola Radio konsideros E-elsendon al Azio, kiam ĝia kontrakto kun satelito pretos. Lee emfazis ke esperantistaj radio-aŭskultantoj estas plejparte opini-formantoj en siaj socioj. Lee kaj Pettyn vizitis lokajn fili-estrojn de la korea aŭto-kompanio Daewoo (kiu nun planas fabriki en Pollando la markojn Espero kaj Cielo), prezentis la esperantistaron kiel ne-neglektindan merkaton, kaj proponis ke Daewoo subtenu E-on. La estroj promesis konsideri la proponojn kaj diskuti kun sia ĉefestro. Lee intencas renkonti altrangulon de Daewoo en Seulo. Vespere, Lee kunsidis ĉe la oficejo de la Varsovia Societo kun inĝ. Jeremiasz Ratajczyk, prezidanto de Pola E-Asocio, kaj aliaj esperantistoj.

La vizito de Lee trafis la 37-an datrevenon de la E-elsendo de Pola Radio. En speciala unuhora intervjuo ("gazetara konferenco") Lee respondis al multaj demandoj pri la agado de UEA, kiujn la aŭskultantoj sendis anticipe.

Rezulte de akurata preparado de Povilas Jegorovas kaj Andrzej Pettyn, la prezidanto de UEA pasigis tre enhavoriĉajn tagojn en Litovio kaj Pollando, kies fruktojn rikoltos unuavice la esperantistoj de la gastigaj landoj. Tamen, ankaŭ la internacia movado gajnas per la amikeco kaj subteno de la renkontitaj politikistoj kaj elstaruloj. (Ekz. ĉiu el ili nun scias el rekta fonto pri la Nitobe-simpozio dum la Praga UK.) Sia propra estrarano pri eksteraj rilatoj, LEE Chong-Yeong ŝajnas "flugi de loko al loko". Kun Mark Fettes kaj aliaj estraranoj li vojaĝis al Parizo kaj Bruselo pasintan oktobron, flugis al Ĉikago kaj Novjorko en januaro, kaj jam planis similan viziton al Ĉinio en aŭgusto.

István Ertl

Novaj el Litovio kaj Litovia Esperantujo.

Beletro tradukita kaj originala.

Historio kaj aktuala.

**Organo de
Litova E-Asocio.**

Aperas 6-foje jare.

**Abonebla ĉe
UEA: 20 gld.**

LITOVA STELO
LIETUVOS ZVAIGZDE

Gejunulojn plu altiras idealoj

Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizo (EKB) tegmentas 35 (kaj ĉiam pli da) organizojn en Eŭropo. En marto ĝi elektis Ralf Gion Fröhlich, reprezentanton de TEJO, kiel sian prezidanton. Ni intervjuis la 22-jaran studenton el Svedio dum unu el liaj preskaŭ ĉiusemajnaj ofic-vojaĝoj al Bruselo.

Anoncante vian elektiĝon (apr., p. 78), ni nomis vin “nia sinjoro Eŭropo”. Ĉu prave?

Jes, en la senco ke EKB tegmentas junularajn organizojn el tuta Eŭropo. Ni intime rilatas al Konsilio de Eŭropo, sed ne estas politike ligitaj al ĝi. Alia grava junulara “platformo”, Junulara Forumo, kunigas organizojn nur el landoj de la Eŭropa Unio.

Kiel vi elektiĝis?

Post manko de konsento inter politike malsam-tendencaj membro-organizoj, ekestis politika vakuo, en kiu estis trafe kandidatigi reprezentanton de politike neŭtrala organizo kiel TEJO. Mi tiel sukcesis elektiĝi preskaŭ unuanime. Per tio mi rikoltas la fruktojn de longa agado de aktivuloj el la TEJO-Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER), homoj kiel Anna Ritamäki, Edlyn Teske, Sabira Ståhlberg. Dum unu jaro, TEJO fakte havis du grandajn sukcesojn krom mia prezidantiĝo: la elektiĝon al la Konsultiĝa Komitato de Konsilio de Eŭropo, kaj la membriĝon en Junulara Forumo de EU.

Jen okazo kiam la ofte pridiskutata neŭtraleco montriĝis absolute utila!

Jes: nia neŭtraleco en la lastaj jaroj fariĝis konata kaj rekonata ĉe la partneraj organizoj. Kompreneble, TEJO laŭ sia statuto ja povas preni politikan starpunkton, kiam temas pri lingvopolitiko aŭ homaj rajtoj, ekzemple kontraŭ subpremaj reĝimoj.

Fakte, kiam Anna Ritamäki, staga en Bruselo, parolis al mi pri mia ebla prezidantiĝo, mi tre surpriziĝis, kaj ne tro emis akcepti tiel grandan taskon. Tamen, iom post iom maturiĝis mia decido: TEJO ja havas respondecon pri EKB, ni devas helpi ĉi tiun eliri el la politika vakuo kiun mi menciis.

Ŝajnas ke vi daŭre vojaĝas...

EKB havas sekretariojn kaj du dungitojn en Bruselo. Do, miaj vojaĝoj plej ofte celas tiun urbon. Almenaŭ dufoje jare okazas komitat-kunsido.

Ralf Gion Fröhlich, kun faldfolioj de Eŭropa Kunordiga Buroo, kiun li prezidas



Foto: Anna Ritamäki

Krome, kiel observanto mi ĉeestos la parlamentajn asembleojn de Konsilio de Eŭropo, kie oni povas renkonti multajn politikistojn.

Oni diras ke vi estas la lasta prezidanto de EKB.

Espereble jes, ĉar laŭ la planoj ni fondos en junio novan junularan platformon, kiu unuigos EKB, Junularan Forumon kaj CENYC (en ĉi lasta membras landaj tegment-organizoj de junularaj asocioj), kaj en januaro 1997 EKB fandiĝos en tiun platformon. Mi trovas tre simbola ke ĝuste esperantisto estis elektita por gvidi tiun kunigan, tut-eŭropigan procezon.

Kiel EKB-prezidanto, vi ne plu estas reprezentanto de TEJO. Mi imagas ke vi tamen trovas okazajn por elmontri vian esperantistecon.

Certe: ĝi ja apartenas al mia iden-teco. Ofte mi devas, prezentante min, klarigi el kia asocio mi venas. Cetere,

ĉiujn oficialajn leterojn mi finas per la esperantlingva formulo “Amike salutas”. TEJO gajnis grandan prestiĝon per mia elektiĝo, des pli ke ĝi okazis ĝuste pro mia esperantisteco. Kaj, kompreneble, mi havas tre multajn okazajn konsiigi aliajn homojn pri la lingva problemoj.

Nun TEJO brilas “ekstere”, pro la daŭra rezultoriĉa laboro de sia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj. Sed ĉu la bazon de TEJO ne minacas la ĉiama problemoj: gejunuloj laboras kelkan tempon, sed ne vidante sufiĉajn rezultojn, baldaŭ malaperas pro familio kaj profesia vivo?

TEJO tamen estas dinamisma kaj multrilate bone funkcia. Ni ja havas vastan gamon da aktivadoj, servoj, publikigaĵoj — kaj krome dediĉitajn homojn. Eble en la interna agado ni devus pli emfazi ke krom esperantista ni estas ankaŭ eduka, kultura, paciga kaj ĝenerale lingvopolitika movado.

Tie kie videblas rezultoj, la aktivuloj ne frustrigas: ekzemplas tion la agado de KER, de la germana junulara movado, aŭ la antaŭ nelonge lanĉita agadtereno de TEJO: labortendaroj. Cetere, mi kredas ke gejunulojn plu altiras idealoj. Eble la amaskomunikiloj iom trompiĝas parolante pri la nuna senidealeco de la junularo. Ĉe ni, esperantistoj, fakte dependas nur de ni ĉu ni sukcesas konigi niajn idealojn kaj atingojn. Ni mem ofte forgesas la esceptan valoron de aferoj kiel senproblema komunikado trans lingvobaroj, Pasporta Servo, la revuo *Kontakto* kiel forumo de gejunuloj el la tuta mondo, sen la kutimaj tordoj de la amaskomunikiloj. Ĉio kion alstrebas la eŭropaj institucioj: liberaj moviĝado, sinesprimo k.s., estas re-invento de tio kion ni jam faras.

Ĉu viaj studado kaj privata vivo ne renversiĝis ekde via elektiĝo?

Estas vero ke mi apenaŭ sukcesas malkapi miajn valizojn antaŭ nova forveturo. Tamen, ĝis nun mi sukcesas ne malfrui en miaj studoj pri politikaj sciencoj kaj internaciaj rilatoj, kaj eĉ plu instrui, en vespera lernejo, la germanan, politikajn sciencojn kaj Esperanton. Sed mi ja ŝatus havi pli da tempo por la geamikoj en Gotenburgo, por atletiko kaj gimnastiko kiel antaŭe, por plu lerni la hispanan, teatrumi... ★

Bjalistoko ne plu silentas

Dum la Varsovia UK (1987) estis lanĉita aŭdaca projekto: Zamenhof-Centro en Bjalistoko. Dum la lastaj jaroj ĝin kovradis silento, sed tio ne signifas ke oni forgesis pri Zamenhof en lia naskiĝurbo.

Oni konceptis la Centron "utila monumento", kiu estus samtempe muzeo, kongresejo, distrejo, profitdona same por la Esperanto-movado kiel por la urbo. Tiu realisma ideo, en kiu koincidis interesoj de la movado kaj de la urbo, trovis fortan apogon de la tiamaj ŝtataj aŭtoritatoj, ĉefe de la parlamentestro (kaj bjalistokano) Roman Malinowski. La urbaj instancoj disponigis terenon provizitan per publikaj servoj centre de Bjalistoko kaj anoncis arkitekturan konkurson, esperante enpuŝi la projekton en la centran ŝtatan planon, sed kalkulante ankaŭ je kontribuo de la E-movado.

Por realigi la projekton estis establita Fondumo Zamenhof, konsistanta el institucioj kaj organizaĵoj urbaj, tutlandaj kaj internaciaj kiel i.a. UEA, ILEI, TEJO. En la tiamaj politikaj kondiĉoj estis pionira laboro fondi organizaĵon kun eksterlandaj membroj kaj enlanda jura personeco. La aktivuloj de la Fondumo, ĉefe Ewa Siurawska, longe baraktis en la burokrata ĝangalo, por ke la projekto ricevu leĝan fundamenton. Samtempe okazis amaso da kunvenoj kaj diskutoj pri la koncepto de la Zamenhof-Centro, al kiuj multe kontribuis la tiama prezidanto de la Fondumo, prof. Humphrey Tonkin.

La abruptaj ŝanĝoj de la politika kaj ekonomia sistemo (1989) starigis la Fondumon antaŭ tute novajn problemojn. Oni ne plu povis kalkuli je ŝtata financa apogo, dum la ebloj de la Esperanto-movado estis tro malgrandaj — oni devis do serĉi privatan, ĉefe eksterlandan, kapitalon. Tiudirekte ekagis kelkaj personoj, ĉefe prof. Tonkin en Usono. Baldaŭ tamen

evidentiĝis ke la malstabila situacio en Pollando ne allogas eksterlandajn investojn, des malpli por celo kiu ne aŭguris rapidan profiton. Oni devis definitive adiaŭi la unuan projekton — sed tio ne signifis ke sinkis la tuta



La sidejo de Fondumo Zamenhof en Bjalistoko

ideo pri la Bjalistoka Centro, kvankam sur la batalkampo restis nur kelkaj personoj, ĉefe Jarek Parzyszek kiel sekretario de la Fondumo kaj mi, kiel ĝia sekva prezidanto.

Subite aperis nova ŝanco. En 1992 estis inaŭgurita en Bjalistoko Infankliniko D-ro Ludoviko Zamenhof. La kliniko konsentis ebligi en sia moderne planita konstruaĵo, almenaŭ parte, la funkciojn de la Zamenhof-Centro. Oni esperis ke la Fondumo rekompence kontribuos al la ekipado de la hospitalo. Dek mil guldenoj, kiujn la Fondumo ricevis donace de Bahaa Esperanto-Ligo, estis transdonitaj al la kliniko por ekipi ekzercejon por paralizitaj infanoj, kiu ricevis la nomon de Lidia Zamenhof. La kunlaboro kun la infankliniko estas daŭre malfermita ŝanco por nia movado.

Dume, dank' al iniciato de la tiama urbestro Lech Rutkowski, Fondumo Zamenhof aĉetis per simbola sumo

la urbocentran terpecon. Kontrakta klaŭzo tamen devigis nin rekonstrui, ene de kvar jaroj, la historian ruinaĵon tiean. Tio superis la financajn eblojn de la Fondumo. Fine ni decidis dividi la nemoveblaĵon kun firmao kiu konsentis financi la tutan rekonstruon. Rezulte, en 1995 Fondumo Zamenhof ekhavis treege valoran propran sidejon, kiu surfacas preskaŭ 80 m².

La agadon de la Fondumo apogas d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof, ĝia Honora Patrono, kiu lanĉis novan ideon ebligantan redifini la celojn de la Fondumo. Temas pri restarigo de la naskiĝdomo de la kreinto de Esperanto. La originala ligna konstruaĵo estis detruita antaŭ kvardek jaroj pro la bezono de nova loĝkvartalo. La domo estas facile rekonstruebla, kvankam ĝi devus ekstari sur alia loko. Ĝi povus grandparte transpreni la funkciojn kiujn oni projektis por la Zamenhof-Centro. Sendube ĝi devus esti ĉefe Muzeo de Zamenhof.

Tiu rekonstruo estis unu el la decidoj kiujn akceptis la estraro de la Fondumo dum sia lasta kunsido (16 dec.). La kunvenon ĉestis tute novaj tre aktivaj personoj: i.a. Kazimierz M. Derkowski, flanke de la vojevodia (distrikta) instanco, kaj reprezentantino de la loka universitato, prof. d-ro Hanna Konopka, kiu akceptis la taskon prezidi la Fondumon Zamenhof.

*Roman Dobrzyński (Pollando)
Prezidinto de Fondumo Zamenhof*


La filmo

**SPUROJ DE
LA AVO**

(60,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA)

montras lokojn ligitajn kun la Zamenhof-biografio. Ĝia profito estas destinita por la rekonstruo de la naskiĝdomo en Bjalistoko.

Esperanto en radio



Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (horoj laŭ UTC)

Ĉiutage			
Japanio, Koreio	11-11:27	Ĉina R. Internacia	6955 9480
Sudorienta Azio	13-13:27	Ĉina R. Internacia	11840 11600 11650
Eŭropo	13:30-14*	Pola R. Varsovio	7145 7285 9525 6000 SAT ¹
Eŭropo	17:25-17:29	Pola R. Varsovio	SAT ²
Eŭropo	18-18:30	Pola R. Varsovio	SAT ¹
Eŭropo	20-20:27	Ĉina R. Internacia	7405 7470 9965
Eŭropo	20:30-21*	Pola R. Varsovio	6035 6095
Latin-Ameriko	22:30-22:57	Ĉina R. Internacia	9480 11500 6950
Nur dimanĉe			
Pacifika Azio	7-7:30	R. Havano Kubo	6195
Orienta Azio	11:30-11:55	R. Aŭstria Internacia	15450
Eŭropo	4:30-4:55	R. Aŭstria Internacia	6155 SAT ³
Eŭropo	11:30-11:55*	R. Aŭstria Internacia	SAT ³
Eŭropo	14:30-14:55	R. Aŭstria Internacia	6155 SAT ³
Eŭropo	19:20-19:30*	R. Vatikana	[mez. 527 1530] 5882 4005 SAT ⁴
Eŭropo, Mediteraneo	19:30-20	R. Havano Kubo	9550
Eŭropo, Mediteraneo	22-22:30	R. Havano Kubo	9550
Norda Ameriko	7-7:30	R. Havano Kubo	6195
Amerikoj, Karibio	15-15:30	R. Havano Kubo	9550
Amerikoj, Karibio	23:30-0	R. Havano Kubo	11760 9550 6195
Dum aliaj tagoj			
merkredo: Eŭropo	19:20-19:35*	R. Vatikana	[mez. 1611] 6185 7365
ĵaŭde: Eŭropo	20:15-20:30*	Estona R.	5006
sabate: Eŭropo	20-20:20	RAI Internacia Roma	11905 9670

*ekde 27 oktobro 1996 unu horon pli malfrue (ĉar konstanta laŭ Meza Eŭropa Tempo)

Satelitaj indikoj konsistas el 3 partoj: nomo de la satelito kaj ties pozicio; frekvenco kaj polarizado (+ nomo de la televid-kanalo); frekvenco de la aŭda subportanto. Koncernas nur Eŭropon, krom pri Radio Vatikana:

- (1) Eutelsat II F6 13 E, 11.476 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz
- (2) Astra, 19.2 E, 11.538 GHz Vpol (VH1), 7.38 MHz (redisaŭdigita per Monda Radioreto [WRN] tra multaj urbaj kablo-retoj en Eŭropo)
- (3) Astra 19.2 E, 11.141 Hpol (BFS 3), 8.10 MHz, per Astra Diĝita Radio (ADR)
- (4) Eutelsat II F1 (13 E), 10.987 GHz Vpol (NBC), 7.38 MHz (en Eŭropo). Intelsat 603 (34,5 W), 4 097.75 MHz (bendo C), polarizado LHCP (Amerikoj). Ankaŭ dum kristanaj festotagoj, samhore.

fonto: OSIEK-AERA, Amikaro de Esperanto en Radio
Pli detalaj informoj en la Jarlibro kaj en la TTT-paĝoj de AERA
(serĉu tra <http://www.knooppunt.be/~fel/>)

Lobiu por Esperanto en radio

Internaciaj radio-stacioj estas plej ofte ŝtataj institucioj: lando elspezas monon por diskonigi sin tra la mondo, por krei al si reton da amikoj. Tiel unuopaj landoj faras paŝeton al la aliaj.

Estu klopodo nia kuraĝigi ilin sur la bona vojo! Ni profitu la okazon sugesti al ili: alparolu ankaŭ nin, en nia lingvo, t.e. en Esperanto. Poŝtkarto nacilingva, kun simpla peto al direktoro de stacio, aŭ longa letero kun argumentoj: ambaŭ utilas. Tiuj institucioj pravigas sin nur per sia aŭskultantaro kaj la ricevitaĵ leteroj.

Skribu al vialanda ambasadoro de la koncerna ŝtato, ekzemple al la ambasado de Aŭstrio, se vi ne plu aŭ malbone kaptas la elsendojn el Vieno; al la ambasado de Italio por peti satelitan disaŭdigon de la programoj el Romo en vian kontinenton ktp. Petu de la ambasado ke ĝi skribu vianome al la direktoro de la stacio.

Ni devas konsciigi ke multaj Esperanto-redakcioj estas traktataj kiel simpatiaj gastoj, sed ne sufiĉe kiel efkaj informantoj kaj kunlaborantoj. Mono mankas. Ni ne aŭdacas postuli! Do, profitu la okazon ke vi estas ne nur esperantisto sed ankaŭ civitano de iu lando: uzu la servojn de la diplomataro. Memoru ke viaj samideanoj en diversaj landoj pagas impostojn por salajri sia landajn diplomatojn en via lando.

La ebloj estas multnombraj. Amikaro de Esperanto en Radio (AERA) regule publikigas precizajn alvokojn al lobiado: plej simple estas sekvi niajn sugestojn. Tiel la agado estas iome kunordigata. Kaj ne hezitu fari sugestojn al nia teamo.

Fine, ni E-parolantoj devas konsciigi ke la tutmondiĝo de amaskomunikiloj okazas ĝuste nuntempe, aparte danke al diĝita persatelita elsendado. Pere de tiu teknologio, vi eble jam povas ricevi en via urbo, relaksitajn per FM aŭ kablo-retoj, multajn altkvalitajn programojn el la tuta mondo, kaj ne nur mallongondajn kapricajn disaŭdigojn. Nu, precipe ĉar la afero estas nova, decidistoj hezitas. Se ni nur petos, ni certe havos ion.

Bruno Masala
Kunordiganto de OSIEK-AERA

Rete atingeblaj radio-redakcioj:
Pola Radio: rafalk@radio.com.pl
Radio Aŭstria: info@rai.ping.at
Radio Vatikana: mc6778@mclink.it
Radio Havano: radiohc@tinored.cu
Radio Radicale: e.r.a.@agora.stm.it

Katolikoj kontribuas al la ekumena elano

Interesate de la lastatempaj atingoj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), Michela Lipari renkontis por ni la novan IKUE-prezidanton, d-ro Antonio De Salvo.

La bulteno de IKUE, *Espero Katolika*, estas fama kiel la plej malnova el la nunaj Esperanto-gazetoj.

Ĝi estas tiom malnova ke ĝi aĝas pli ol la movado kies organo ĝi estas. La unua numero de *Espero Katolika* aperis en 1903, fondita de pastro Emile Peltier (1870-1909), kaj IKUE mem fondiĝis nur en 1910.

Kiel evoluis IKUE tra nia jarcento riĉa je militoj, persekutoj, plej diversaj politikaj reĝimoj?

Komence de la tridekaj jaroj la revuo eldoniĝis en Hispanio, kiam eksplodis la interna milito. En 1939 oni translokiĝis al Belgio kaj Nederlando, kaj kiam okazis la invado de tiuj landoj, la arkivon oni portis en Pragon, kelkajn monatojn antaŭ la enirrompo de la nazioj, kies Gestapo konfiskis kaj detruis ĉiujn dokumentojn.


Meze de tiuj pezaj momentoj, reliefigas la figuroj de noblaj kaj elstaraj samideanoj, kiuj donas modelajn ekzemplojn de kred-atestoj. Al nia movado apartenis pastro Titus Brandsma, viktimo en koncentrejo, beatproklamita de la Papo. Aliaj elstaraj IKUE-anoj estis pastro Juan Font Giralt, kruele murdita dum la hispana milito, pastro Dombrowski, pioniro de la litova movado, pastro Andreo Cseh, kaj multaj, multaj aliaj. Dum la jaroj de la fera kurteno orient-eŭropaj IKUE-anoj estis procese kondamnitaj pro religia agado pere de Esperanto.

Malgraŭ ĉio la movado daŭris, dank' al la tre sindonema, malavara, konstanta zorgado de multaj, kiuj kondukis nian Unuiĝon ĝis la realaĵo kiun ĝi hodiaŭ konsistigas kadre de la katolika Eklezio kaj en la Esperanto-movado.

Kion vi povas rakonti pri la rilatoj IKUE-Vatikano?

Se temas pri la ŝtato Civito Vatikano, IKUE havas neniun rilaton. Se

oni celas la Sanktan Seĝon, la diplomatan subjekton rekonitan de multaj landoj kaj de UN, IKUE ĉeestas kadre de la Pontifika Konsilio por Laikoj, kiel privata asocio de fideluloj laŭ la papa juro. Tia statuso similas al tiu de movadoj kaj neprofitcelaj organizaĵoj — oficiale agnoskitaj kun jura personeco — fronte al registaro. Krome IKUE ricevas de Radio Vatikana "antenan spacon" por la esperantlingvaj elsendoj, volontule realigataj.



Abraham kaj Melkicedek. Romanika fresko (ĉ. 1225) en la katedralo de Anagni (Italio). El giganta eldonaĵo de IKUE, *Roma Meslibro* (vd. p. 95).

Kiel konate, alia institucio de la Sankta Seĝo, la Kongregacio pri la Dia Kulto kaj la Disdisciplino de la Sakramentoj, aprobis la tekston de la esperantlingva *Meslibro kaj Legaĵaro por dimanĉoj kaj festoj*. Temas pri rezulto de kolosa laboro traduka kaj eldona: du volumoj el preskaŭ mil paĝoj, lukse presitaj kaj binditaj.

Kiel vi rilatas al aliaj esperantistaj religiaj movadoj?

Plej striktan rilaton IKUE havas kun

Kristana E-Ligo Internacia: nin unuigas la elementoj de la kristana kredo kiujn ni havas komunaj, sed ĉefe la ekumena dialogo, devo de ĉiu kristano. Ni kongresas kune — la venonta Ekumena Kongreso okazos en Hungario, fine de julio [vd. marto, p. 55 — *Red.*]. La dialogo inter IKUE kaj KELI estas fruktodona, ĉefe je nivelo de la renkontiĝo inter diverskonfesiaj movadoj. Ĉi-teme mi ŝatas reliefigi ke la kristana E-movado rajtus difini sin "monda pioniro de ekumenismo": jam en la 2-a UK en Ĝenevo (1906) la informo pri mesaĝo de la tiama Papo al la redaktoro de nia revuo estis bonvenigita kaj aplaŭdita ankaŭ de nekatolikoj.

Kun aliaj religiaj esperantistaj movadoj mankas dialogo, tute ne ĉar ekzistus baroj aŭ malamikeco, sed ĉar simple mankis okazo. IKUE pretas dialogi interreligie kun ĉiuj surbaze de reciproka respekto.

Kiuj estas la celoj, la prioritatoj por IKUE perspektive al la jubilea jaro 2000?

Koncerne la ekumanan elanon, la esperantistaj katolikoj povas kaj devas doni kvalifikitan kontribuon. IKUE jam preparas sian kongreson en Rimini kaj Romo venontjare. Ni jam laboras por la realigo de la biografioj de niaj martiroj kaj kred-atestantoj, aldone al la esperantlingva traduko de ĉiuj Ekleziaj dokumentoj pri amas-komunikiloj kaj komunikado. Ni disvas-

tigas nian "trezoron", la esperantlingvan *Meslibron* kaj *Legaĵaron*.

D-ro De Salvo, kion signifas ke IKUE elektis prezidanton kiu, post 25 jaroj, estas denove laiko?

Havi prezidanton kiu ne estas pastro signifas hodiaŭ ion alian ol antaŭ jaredekoj, ĉar plifortiĝis iusence la rolo de la laikoj ene de la Eklezio. En la nuna epoko la Eklezio donas multe pli da atento al la mondo de la laikaro, kaj ĉi tiu siaflanke surprenas ĉiam pli

da konscio, da kreskanta rolo en la vivo de la Eklezio.

Ĉu via prezidanteco estas en kontinueco kun la antaŭa?

Permesu ke mi esprimu la amemon, kaj cetere, dankemon, la admiron, la estimon por pastro Duilio Magnani, kiu gvidis IKUE dum 15 jaroj plenaj je signifaj momentoj kaj rimarkindaj sukcesoj, pli ol iam antaŭe — el kiuj multaj realiĝis dank’ al lia agado senlaca. Pro trookupiteco kiel paroĥestro en Rimini — kie somere loĝadas centmiloj da homoj — pastro Magnani devis rezigni la prezidantecon. Post la novaj atingoj — precipe post la oficiala agnosko ricevita de la Sankta Seĝo — estis necese elekti prezidanton kiu loĝu en Romo, por povi prizorgi ĉiujn elpaŝojn kunligitajn kun la neceso atingi juran personecon de la Asocio fronte al la itala ŝtato.

Kiuj estos viaj aliaj taskoj, projektoj?

IKUE nuntempe vojaĝas sufiĉe trankvile: ĝi estas for de periodoj kiam ĝia plua ekzisto mem ne estis certigita pro manko de financaj rimedoj kaj de

kunlaborantoj. Ni povas trankvile rigardi al la estonteco. Unue, ekzistas certa bonhavo (akumulita dum multaj paciencaj jaroj), kies rentumo sukcesas kovri almenaŭ la minimuman fiksitan agadon: la eldonon de la revuo, la administradon, la radiajn elsendojn ktp. Sed entrepreni ion novan, kiel ni ja volas, estus malfacile sen la subteno de ĉiuj membroj kaj, pli ĝenerale, bonvolaj samideanoj. Por konkretaj projektoj neniam mankis financa subteno — fakte, ankaŭ de ne-membroj: sufiĉas pensi pri la kampanjo “Doni domon al IKUE”. Cetere ĝuste la kostoj de la nova Centra Oficejo multe pezas sur la eta buĝeto de nia Asocio. Restas do limigita panoramo por novaj iniciatoj, dependaj de ĉies subteno.

Por la pli proksimaj monatoj la ĉefa laboro estos la ĝenerala restrukturado de nia Asocio. La estraro kaj la plenumkomitato de IKUE, kiuj estis reelektitaj, devos reorganizi la tutan reton de landaj reprezentantoj; meti ordon en la kotizojn, ne plu respondajn al la valuta situacio en la mondo; inventari la fakulecojn kaj spertojn de

nia membraro, por povi rapide disponi, kiam necese, je taŭga kunlaboro. Ni devos kampanje relanĉi la aliĝojn al nia Unuiĝo: bedaŭrinde dum la lastaj jaroj malkreskis la aliĝoj, ĉar kiam oni strebas al pli ĝeneralaj, pli altaj celoj, oni preskaŭ ĉiam malpli atentis la pli ĉiutagajn aferojn.

Temos sekve pri interna agado, almenaŭ dum la baldaŭa periodo.

Jes, plejparte estos tiel. Sed ni ne forgesu ke, koncerne la tiel nomatan eksteran mondon, IKUE havas jam gravan farendaĵon: realigi la gazetaran kampanjon pri la ĵus fine aperinta *Meslibro kaj Legafaĵaro*, organizi la vendadon, prezenti ĝin al la Ekleziaj aŭtoritatoj. Krome, devos okazi ankaŭ la oficiala inaŭguro de la nova Centra Oficejo, ĝis nun prokrastita pro teknikaj kaŭzoj. Ĉi tiu inaŭguro estos bona okazo por paroligi pri la katolika Esperanto-movado. ★

La adreso de IKUE estas: Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 Roma, Italio; ☎/☎+39/6/632-839; ☐ c.sarandrea @agora.stm.it.

AKADEMIO DE ESPERANTO

Ne izolita, elita Akademio

Post debuto en februaro (p. 30) kaj daŭrigo en aprilo (p. 70), la rubrikon de la Akademio nun unufoje subskribas ĝia prizorganto, Amri Wandel, akademiano, estrarano de UEA pri scienca kaj faka agado.

En februaro vi povis legi pri la plej gravaj taskoj de la Akademio laŭ la vidpunkto de ĝia novelektita gvidantaro. Esence temis pri tri elementoj: fundamento, vortaro kaj komunikado. La ideoj pri ili sendube difinas indan kaj grandsignifan taskaron por la Akademio, sed eblas konsideri ankaŭ aliajn vidpunktojn, eble malpli tradiciajn. Por demonstri tion, kaj por instigi la legantojn kontribui al tiu ĉi rubriko, mi prezentas la tri elementojn supre menciitajn el alternativaj vidpunktoj (kiuj ne nepre spegulas mian personan opinion aŭ tiun de aliaj akademianoj).

Fundamento: la tradicia vidpunkto pri la rolo de la Akademio (koncerne la lingvan evoluon ĝenerale) estis ke ĝi devas protekti la lingvon kontraŭ tro rapidaj ŝanĝoj. Prave, se temas pri la “konservado kaj protektado de la fundamentaj principoj de la lingvo

Esperanto”. Sed kio estas “tro rapidaj ŝanĝoj”? Ĉu ne venis la tempo iom liberaligi la konservativan sintenon de la Akademio pri alprenado de vortoj kiuj estas uzataj dum jaroj en la gazetaro, la literaturo kaj en la parola lingvo sen la aprobo de la Akademio, foje eĉ spite al ties opinio?

Vortaro: certe ne malpravas la opinio ke la Akademio devas partopreni en la revizio de PIV aŭ en ellaboro de nova granda vortaro — sed oni konsciu ke temas pri enorma tasko, kiu bezonas dediĉon de tuta vivo. Unuopuloj kiel Waringhien tion faris, kaj eble faros, sed estas malfacile imagi ke la Akademio kiel tuto povos grave roli en tia laboro. Ĝi eventuale kontribuos per konsilado kaj sugestoj pri specifaj vortoj kaj terminoj.

Komunikado: prave la intervjuitoj kritikis la ĝisnunan informfluan inter la akademianoj, sed kio pri la “eks-

tera” komunikado, tiu inter la Akademio kaj la cetera movado? Lingvo evoluas pro siaj parolantoj (kaj legantoj...) — sed en la pasinteco la Akademio ekhavis (prave) bildon de izolita, elita grupo.

La Letero de l’ Akademio estis tro malofta kaj ne atingis sufiĉe vastan publikon por plenumi la funkcion de “ekstera” komunikilo. Post la forpaso de kolego Thierry kaj la ĉeso de *La Letero*, mi proponis enkonduki en ĉi tiu revuo rubrikon Akademian, kiu anstataŭ *La Letero*, kaj samtempe servu kiel komunikilo kun la tuta movado, ne nur por unudirekta fluo de informoj pri la laboro de la Akademio aŭ por lingvaj demandoj, sed ankaŭ kiel podio por diskutoj kaj reagoj de legantoj.

D-ro Bormann, la nova prezidanto de la Akademio, akceptis la proponon kaj petis min prizorgi la rubrikon. Ĝi ne estos oficiala organo de la Akademio, nek aperos regule (ĝia ofteco dependos ankaŭ de viaj reagoj kaj kontribuoj), sed mi esperas ke ĝi ja estos interesa, penso-provoka kaj reago-veka.

Amri Wandel

Ĉu ni bezonas lingvopolitikon?

Jen kaj jen dum la lastaj tri aŭ kvar jaroj leviĝis diskuto pri la neceso havi iun "lingvopolitikon de UEA" aŭ, pli vaste, "de la Esperanta lingvo-komunumo".

Tiu temo estis laste traktita dum la 80-a UK en Tampere, en komitata komisiono pri lingvopolitiko kaj en parto de la Esperantologia Konferenco.

La Komitato eĉ rezoluciis:

— *konsiderante la diskutojn en la laborgrupo pri lingvopolitiko kaj en la koncerna parto de la 18-a Esperantologia Konferenco,*

— *konsciante pri la neceso ellabori koheran lingvopolitikon de UEA, adekvatan al la bezonoj de la Esperanto-komunumo,*

1. [ĝi] kreas konstantan komisionon pri lingvopolitiko,

2. komisias ĉi-tiun komisionon okazigi seminarion pri "lingvopolitiko de UEA" rekte antaŭ la 81-a UK, 1996 en Prago,

3. komisias la komisionon ellabori konvenajn proponojn pri lingvopolitiko de UEA kaj prezenti ilin al la komitata kunsido en Prago."

Sed kio estas lingvopolitiko?

Kaj se ni proksimume scius pri kio temas lingvopolitiko, ĉu ni bezonas ĝin?

Elirpunkto certe estas la fakto ke dum la komitataj kaj estraraj kunsidoj de UEA ĝenerale mankas tempo por vere sisteme trakti bazajn problemojn, ne nur de UEA, sed de la tuta Esperanta lingvo-komunumo. Agadoj malaperas. Novaj rimarkeblas. Granda aro da agadoj tamen ja dependas de unuopuloj, kaj pli sekvas el individuaj intuicioj kaj preferoj ol el pensado pri prioritataj necesoj. Strategie gravaj kampoj restas neplugitaj. Pri aliaj oni investas multe da energio, kvankam niaj homaj kaj financaj fortoj ne kreskas adekvate.

Ja klarigebla situacio: por iuj Esperanto simple estas kreiva ludilo sen sociaj ambicioj, por aliaj — tamen — alternativo al la nuna internacia komunikado-ordo. Denove aliaj vidas en la lingvo-komunumo iun apartan minoritatan lingvan kultursocieton.

Do, ni pli klare konsciu ke nia lingvo-komunumo ne estas homogena. Multas la vidpunktoj pri tio kiel ĝin teni bon-

farta kaj kiel kvante kaj kvalite plu evoluigi ĝin.

Sed ni ja povus lerni de la etnolingvaj komunumoj. De jarcentoj tie ŝtatoj, internaciaj organizaĵoj kaj institucioj, aŭ eĉ unuopaj influhavaj personoj, sin tenis aktive al sia(j) lingvo(j).

Ili provas, depende de siaj celoj, influi la socian pozicion de difinita(j) lingvo(j) kaj eĉ la lingvo(j)n mem, kompreneble kun tre malsama sukceso. Ĉio ĉi estas ligita kun la du bazaj nocioj lingvopolitiko kaj lingvoplanado.

labordifinon ke lingvopolitiko de la Esperanto-komunumo (LPEK) estu la strategio kaj taktiko de la E-komunumo por

- a) konservi certan staton de Esperanto kiel lingvo (ekz. laŭ-fundamenteco, stabileco);
- b) krei evolu-kondiĉojn por Esperanto kaj evoluigi ĝin por celoj ĝeneralaj (ĉiutaga lingvo ktp.) kaj specifaj (faka, beletra, familia . . .);
- c) konservi resp. atingi certan socian statuson de Esperanto en la neesperantista socio.

Por pli bone kompreni la interrilatojn de a)-c), estus utile distingi inter a) interna kaj b) ekstera lingvopolitiko.

Sub interna LPEK ni provizore



Ĉu turni la dorson al la ekstera mondo? Necesas lingvopolitiko, interna kaj ekstera, por la E-komunumo. (Esperantistaj partoprenantoj de la 4-a UN-konferenco pri Virinoj, Pekino 1995.)

En la socilingvistika literaturo ekzistas diversaj difinoj pri lingvopolitiko. Ofte ĝi komprenatas kiel la strategio (celaro) kiun ŝtato aŭ organizaĵo havas pri la statuso (pozicio) kaj kvalitoj de sia(j) lingvo(j). Tio ofte parte identas kun lingvoplanado, kiu tamen kovras eble malpli ol lingvopolitiko. Krome, en etnaj lingvoj parte sinonimas kun lingvopolitiko kaj lingvoplanado la terminoj *lingva inĝenierado*, *lingva normigado*, *lingva direktado*, *lingva kulturo*, *lingva evoluigo* ktp.

Interne kaj ekstere: labordifinoj

Ne povante ĉi tie diskuti la diversajn konceptojn, mi proponas kiel

komprenu la strategion kaj taktikon de la E-komunumo celantajn:

- konservi la stabilecon de E-o kiel lingvo, klare fiksi kaj respektigi ĝian normon;
- plu evoluigi E-on, adekvate al la nuntempaj kaj estontaj komunik-bezonoj (inkluzive fakan aplikon, planadon kaj normigadon de terminologiaj principoj kaj de kernaj terminaroj mem);
- krei modernajn kaj aktualajn registriilojn pri la lingvo;
- esplori je adekvate scienca nivelo la strukturon, funkciadon, evoluon kaj aplikon de E-o (kaj precize dokumenti tiun esploron, i.a. per bibliografiado);

- klerigi la E-komunumon, por krei en ĝi komprenemon kaj aktivan rilaton al LPEK;
- aktivigi ekzistantajn instancojn, resp. krei novajn por realigi la internan LPEK.

Sub ekstera LPEK ni provizore komprenu la strategion kaj taktikon de la E-komunumo celantajn:

- krei por E-o favorajn kondiĉojn en la neesperantistaj sciencaj, politikaj kaj aliaj sociaj medioj *naciaj*;
- krei por E-o favorajn kondiĉojn en neesperantistaj politikaj, fakaj kaj aliaj sociaj medioj kaj organizaĵoj *internaciaj* (UN, Unesko, fakaj mondaj organizaĵoj k.s.) kaj organizaĵoj de ŝtatoj (ekz. Eŭropa Unio);
- kompetente kaj adekvate defendi E-on kontraŭ neseriozaj kaj malĝustaj atakoj.

Nur kun bone funkcia interna LPEK estas antaŭvideblaj pli grandaj sukcesoj en la ekstera LPEK.

Ĉu ni entute bezonas LPEK?

Ŝajnas al mi ke nepre jes. Ja ekzistas tuta gamo da taskoj daŭre nesufiĉe realigataj, i.a. pro manko de homaj kaj financaj fortoj, sed ne malofte ankaŭ pro manko de konscio pri la prioritato de tiaj taskoj.

Cetere, estu tute klare kaj substrekte ke ekzistas neniu intenco dubindigi la laboron de ekzistantaj E-institucioj kiel Akademio de E-o, Centro por Esploro kaj Dokumentado ktp — eĉ kontraŭe.

Se ni disponas koheran lingvopolitikan koncepton, eble estos pli facile kunordigi kaj fokusigi la mal-

multajn homajn kaj financajn fortojn al prioritataj agadoj, eventuale eĉ akiri novajn fortojn. Ilustru tion ne-elĉerpa listo de traktindaj temoj:

- La koncepto pri lingvopolitiko kaj lingvoplanado rilate al etnolingvoj, kiom kaj kiel ili estas uzeblaj por Esperanto?
- Kadroj de interna kaj ekstera lingvopolitikoj de Esperanto.
- Lingvaj institucioj por etnaj lingvoj — ĉu kaj kion eblas lerni de ili por Esperanto?
- La rolo de la Akademio de Esperanto kiel gvida lingvoinstitucio de la E-komunumo.
- Kion kovras la nuntempa normo de E-o? Kiom stabila ĝi estas aŭ estu? Kiel certigi ĝian respektigon?
- Situacio kaj bezonoj por la faka apliko kaj la faka lingvo (i.a. rolo de la reaktiviginda Terminologia E-Centro).
- Esperantaj leksikografio, gramatiko kaj stilistiko en perspektivo — kiuj bezonoj kaj kiel realigi ilin?
- Politiko pri esplorado (interlingvistiko/esperantologio): kiuj temoj prioritatas?
- Eldonpolitiko (beletro, faka literaturo, diversspecaj periodaĵoj, enciklopediecaj registriiloj, instruiloj, interlingvistikaj kaj esperantologiaj publikigaĵoj kaj periodaĵoj, laŭcelgrupaj informiloj...).
- Interna dokumentado kaj bibliografiado (biblioteko, muzeoj, publikaj kaj privataj kolektoj, bibliografioj, katalogoj...).
- Arkivoj de asocioj kaj instancoj

landaj (je centra, regiona kaj loka niveloj) kaj internaciaj.

- Politiko pri historiografio.
- Nova, daŭre kompletigebla Enciklopedio de Esperanto.
- Rolo de la novaj elektronikaj komunikiloj.
- Klerigo kaj edukado de la e-istoj por komprenigi la esencon de LPEK.
- Kiel impulsi kaj kunordigadi la lingvopolitikon? Ĉu ni eventuale bezonas “Konsilantaron pri Lingvopolitiko de Esperanto”? Se jes, kiel ĝi agu neburokrate kaj efike?

Ne pri ĉio ĉi diskutos seminario pri “Lingvopolitiko de UEA”, sabaton, la 20-an de julio 1996, rekte antaŭ la UK en Prago. Sed ĝi klopodos trakti almenaŭ jenajn tri ĉefajojn:

1. Lingvopolitiko kaj lingvoplanado: bazaj konceptoj

- 1.1. Lingvopolitiko pri etnaj lingvoj.
- 1.2. Lingvopolitiko pri Esperanto.

2. La leksiko de Esperanto kaj ĝia registriĝo

- 2.1. Ĉefaj tipoj de vortaroj en etnaj lingvoj kaj en Esperanto.
- 2.2. Novaj defioj kaj ebloj por la ĝenerala leksikografio de Esperanto.

3. Konkludoj kaj planoj

- 3.1. Konkludoj el 1. kaj 2.
- 3.2. Kiel daŭrigi pri lingvopolitiko realige al la komitata rezolucio?

Interesatoj partopreni kaj kontribui sin direktu al la aŭtoro, organizanto de la seminario:

Detlev Blanke

Otto-Nagel-Str.110

DE-12683 Berlin, Germanio

☎+49/30/541-26-33, ☐545-67-42

Umberto Eco ree pri Esperanto

*El intervjuo al la radio Paris
Première (27 feb. 1996):*

“... Mi iom studis ĉiujn tiujn uto-
piojn pri kreado de lingvo perfekta
aŭ de la origina, Adama lingvo, ĝis
tiuj lingvoj kiujn oni nomas uni-
versalaj, kiel Esperanto, volapuko
kaj aliaj, sed ne celas esti perfektaj
lingvoj, sed helplingvoj. Kaj je tiu
okazo mi eĉ studis la gramatikon
de Esperanto por kompreni pri kio
temas. Kaj mi venis al du konkludoj.
Ĝi estas tre, tre bone farita lingvo.
El lingvistika vidpunkto, ĝi vere sek-
vas admirindajn kriteriojn de [lingva]
ekonomio kaj efikeco. Due, ĉiuj mo-

vadoj por internaciaj lingvoj fiaskis,
sed ne [tiu de] Esperanto, kiu plu
kunigas aron da homoj ĉie en la
mondo, ĉar malantaŭ Esperanto es-
tas iu ideo, idealo; mi celas ke Za-
menhof ne nur konstruis lingvan
objekton, sed malantaŭ tiu estis ideo,
[...] ideo de frateco, ideo pacisma,
kaj tiu forto de idealo — pro kiu
la esperantistoj eĉ estis persekutataj
sub la naziismo kaj la stalinismo —
konservas ankoraŭ la komunumon
de la e-istoj. Oni ne povas diri ke ĝi
fiaskis. Sed necesas diri unu aferon.
La kialo pro kiu iu lingvo sukcesas,
estas ĉiam nedifinebla.” (H. Masson)



81-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Prago (Ĉeĥa Respubliko), 20-27 julio 1996



Loĝigo

La kongresan administracion atingis jam ĉ. 400 mendiloj por loĝado kaj aliaj servoj. En ĉiuj hoteloj restas sufiĉaj liberaj lokoj mendeblaj, inkluzive la plej mendatajn — kaj plej proksimajn — Forum kaj Panorama, kaj la ekonomiprezajn studentajn loĝejojn Jednota. **Nur en hotelo Attic ne plu mendeblas lokoj.** La amasloĝejo (nur por gejunuloj malpli ol 29-jaraj!) kostos 45 gld. por la tuta kongresa semajno kaj funkcios nur dum ĝi (20-27 jul.). Informoj ĉe: Vladka Chvátilová, Vysočanská 763, CZ-582 Světlá nad Sáz, Ĉeĥio.

Flugvojaĝo

UEA organizas flugvojaĝon de Amsterdamo al Prago kaj reen, kontraŭ tre alloga prezo (485 gld.).

Infana Kongreseto

Ĝi okazos en Rabině, apudlaga feriejo. Ĝis nun aliĝis dekkvino da infanoj. Ĉiuj informoj kaj aliĝoj ĉe la UEA-komisiito pri infanaj aferoj: Christopher Fettes, St. Columba's College, Dublin 16, Irlando. Fakso: +353/1/493-66-55. Bv. noti ke la fakso numero en la Dua Bulteno estis erara.

IKU-prelegoj

La Estraro de UEA dum sia ĵusa kunsido elektis prelegantojn por la 49-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. Por la unua fojo en la historio

de IKU prelegos Nobel-premiito: prof. Reinhard Selten gvidos komunan kurson de Akademio Internacia de la Sciencoj kaj de IKU pri ludo-teorio. Laŭ lia aparta peto, la kurso okazos dum la ekskursita tago mekrede, krom la komenca IKU-prelego, kiu sekvos la inaŭguron de IKU (dimanĉo, 14h30). Alian AIS/IKU-kurson prezentos prof. Ignat Bociort, pri la temo "Estetiko de beletra verko". Aliaj prelegantoj: prof. Vlastimil Novobilský (la rektoro de IKU), John Wells, Marjorie Boulton, Věra Barandovská-Frank, Kep Enderby, Josef Kavka kaj Mauro Nervi.

Teatro

Dum la kongreso ni havos okazon spekti diversajn ĝenrojn: klasikan teatraĵon en plenumo de klasika movada trupo, Bulgara Esperanto-Teatro, kortuŝan monodramon kun bohemia historia temo, prezentotan de Eva Seemannová, kaj kabaredon de f-ino Barlaston. Apartan atenton meritas la spektaklo de la fama Esperantlingva magiisto Trixini.

Artaj aranĝoj

El pluraj koncertoj aparte menciindas tiu, unuafoja en UK, de la jam famiĝinta nederlanda koruso Akordo. Por la unua fojo prezentos memstaran koncerton ankaŭ la itala komponisto kaj pianisto Aldo Fiorentin, kies muzikigo de "Preĝo sub la Verda Standardo" estis jam aŭdebla en Tamperejo.

Aliĝoj

Ĝis la mezo de aprilo aliĝis 2500 kongresanoj el 57 landoj. El tio ĉ. 340 estas ĉeĥoj, iom pli ol 300 germanoj, preskaŭ 200 francoj kaj ĉ. 140 japanoj.

Kotizoj

Ĝis la 15-a de junio (post tiu dato oni ne sendu aliĝilojn al CO, sed aliĝu surloke en Prago): individua membro de UEA (IM): 324 gld.; ne-IM 402. Tarifo por landoj B: IM 242; ne-IM 302. Junuloj, handikapuloj, kunuloj kaj komitatanoj de UEA: IM 162; ne-IM 242. Tarifgrupo B: IM 121; ne-IM 182.

Kotizoj Adelajdo

La bazaj kotizoj ne ŝanĝiĝis por la 82-a Universala Kongreso de Esperanto (Adelajdo, Aŭstralio, 19-26 julio 1997): 215 gld. por Individua Membro (IM); 270 por ne-IM; 162 por IM en B-lando; 202 por ne-IM en B-lando. Junuloj, kunuloj, komitatanoj kaj handikapuloj: IM 107, ne-IM 162 (B-tarifaj landoj: IM 81, ne-IM 121). Sed bonvolu noti ke ja ŝanĝiĝis la kotizperiodoj. **La unua periodo, dum kiu validas la plej favoraj kotizoj, daŭras ne plu ĝis la jarfino, sed nur ĝis la fino de septembro.** Ne maltrafu eblajn rabatojn!

Viktorio EKPAROLIS

La projekto EKPAROLI, Esperanto Kiel Propedeŭtiko Al Rapidigo de Orientazia-Lingvo-Instruado ĉe Universitato Monash (Melburno, Aŭstralio), progresas jam de pli ol jaro.

Viktorio estas unu el la sep aŭstraliaj ŝtatoj, el kiuj ĉiu mem respondecas pri sia enlerneja edukado. En 1993, post longdaŭra tutlanda diskutado pri instruado de lingvoj, estis publikigita nacia “blanka papero” (politika dokumento). Laŭ ĝi la ŝtatoj rajtis elekti instruotajn lingvojn el listo de dek kvar lingvoj, eŭropaj kaj orient-aziaj. Ŝtato Viktorio elektis ok lingvojn, kvar “eŭropajn” — la francan, germanan, grekan kaj italian — kaj kvar “orient-aziajn” — la indonezian, japanan, mandarenan kaj vjetnaman.

Por la lerneja jaro komencita januaron 1994, la registaro de Viktorio ordonis al ĉiuj ŝtataj lernejoj, unuagradaj kaj duagradaj, ke ili planu programon de lingvolernado, komencotan en februaro 1995. La granda demando estis: kie trovi la instruistojn kaj kiu(j)n lingvo(j)n instrui? Regis dum la tuta jaro granda maltrankvilo en la lernejoj komunumoj, ĉar en Aŭstralio estas parolataj ĉirkaŭ 150 lingvoj inkluzive de la indiĝenaj; krome, la registaro unue ne devigis la lernejojn elekti nur el la deciditaj ok lingvoj. Tiel la lernejoj konsilantaroj devis multe interdiskuti antaŭ ol fari finan decidon. Eĉ se unu aŭ du lingvoj estis elektitaj, restis la problemo de sufiĉe kompetentaj instruistoj.

Tia estis la klimato kiu naskis la projekton EKPAROLI, post kiam mia edzo, Alan Bishop, profesoro de edukado ĉe Universitato Monash, legis la Esperanto-dokumenton *Al nova internacia lingvopolitiko: La propedeŭtika valoro de Esperanto* de Edward Symoens. Tamen ne sufiĉe frue li petis monrimedojn de Esperanto-asocioj en Aŭstralio por starigi oficejon, dungi esplorantojn ktp. La projekto komenciĝis en oktobro 1994, kiam la lernejoj plejparte jam instalas lingvo-programon por februaro 1995. Telefonante al 98 unuagradaj lernejoj, ni tamen sukcesis trovi tri lernejojn, ok klasojn kaj ok instruistojn kiuj estis pretaj eklerni kaj samtempe instrui la lingvon kun granda helpo de la EKPAROLI-teamo. Interese: du el la

tri lernejoj enhavas plejparte brit-devenajn, anglalingvajn infanojn, dum la tria konsistas el lernantoj de 39 etnaj grupoj kaj lingvoj. Antaŭ la komenco de la lerneja jaro, la naŭ instruistoj konsentis partopreni kvartagan kurson pri la fundamentoj de Esperanto, kio necesis ĉar en Viktorio bedaŭrinde ne ekzistas “provizo” de E-instruistoj. Nur du el la naŭ instruistoj iam ajn lernis iom da fremda lingvo.



Antaŭ ol EKPAROLI, aŭstraliaj bazlernejoj ekkantis Esperante.

Dum la tuta lerneja jaro, de februaro ĝis decembro 1995, lernis Esperanton 9 instruistoj kaj proksimume 240 infanoj (10-12-jaraj) de la kvinaj kaj sesaj klasoj en tri unuagradaj lernejoj. La materialojn, nome du kompletojn de 20 porinfanaj laborfolioj, verkis du dungitaj esploristinoj, laŭ la vidbenda provleciono de *Mazi en Gondolando*. BBC donis al la projekto permeson uzi pliajn originalajn desegnojn el la angla versio.

La esploristinoj verkis anglalingvajn demandarojn por la infanoj kiuj lernas E-on, kaj por infanoj lernantaj alian lingvon, ekz. la francan, germanan, indonezian aŭ japanan. La demando pritraktas la propran lingvon de la infanoj, la lingvojn de iliaj gepatroj, kaj la lingvojn lerneje instruatajn al ili (ankaŭ en sabataj lernejoj por


enmigrintoj); ĝi traktas ankaŭ la ĝeneralan sintenon de la infanoj pri lingvolernado kaj ties dumviva valoro. Estis planita kaj plenigita ankaŭ demando por la instruistoj pri ties lernantoj.

La informoj estas nun enkomputiligitaj. La esploristoj detale ekzamenos ilin, sed jam klare videblas diferenco inter la sinteno de Esperanto-lernantoj kaj tiu de lernantoj de aliaj lingvoj. Unuavide ŝajnas ke la unuaj multe pli ĝuas lingvolernadon ol la aliaj. Tamen necesas studi ankaŭ la demandarojn porinstruistajn kaj la rezultojn de ekzamenoj post unu jaro antaŭ definitiva taksado de la projekto.

Ni nun estas kontentaj ke en 1996 du lernejoj daŭrigas la instruadon de Esperanto kaj ke alia komencos sian lingvo-instruan programon, eble en la kvara klaso, per E-o, sed daŭrigos per la franca lingvo. La plua ekzisto de E-instruado dependos multe de la registaraj instancoj, kiuj serĉas simplan, laŭplanan programon de lingvoinstruado; ili nun deziras ke ĉiu lernejo elektu unu aŭ du lingvojn el la ŝtate aprobita listo de kvar “eŭropaj” kaj kvar “orient-aziaj” lingvoj. Ni nun esperas ke almenaŭ la ĉi-supra plano sukcesos dum la lerneja jaro 1996, por ke kelkaj el tiuj infanoj povu renkonti eksterlandajn samaĝulojn en la infankongreseto de la 82-a UK en 1997, Adelajdo.

*Jennifer Bishop
Fakultato Edukada, Universitato Monash
Melbourne, Victoria 3168, Aŭstralio*

Recenzoj



Premiero plurmedia, pli distra ol instrua

Un privé dans la nuit ("Detektivo en la nokto"). Pétillon. Nanterre: Memory Access, 1995. Kvin-lingva kompakt-diska bildstrio. Al Esperanto trad. Michel Audibert. Voĉlegas M. Audibert, J. Thierry. Bezonataj: minimume CPU 80486DX – 33 MHZ, SVGA monitoro, 8 MB ĉefmemoro, codorom-legilo kongrua kun plurmedia PC, Sound Blaster-kongrua sonkarto, Vindozo 3.1 aŭ posta. 48,00 gld.

Ĉi tio estas supozeble la unua stordisko (KD-ROM) en Esperanto. Ĝi prezentas francan bildstrion pri unike fuŝa privata detektivo, laŭ etoso kiun oni povus atendi en *La Kancerkliniko*. Ĝi vidigas 300 senmovajn kolorajn bildojn, kiuj formas 16 libere elekteblajn rakontojn de diversaj longecoj. La enbildaj tekstoj estas francaj, sed laŭelekte en tri aliaj lingvoj (hispana, Esperanto kaj la angla) oni ricevas subtitolojn (tute majusklaĵojn kaj ne tro facile legeblajn) kaj (krome en la japana) laŭtleĝon kun konvenaj kaj foje amuzaj son-efektoj.

Kvankam oni klakas usonan flagon por la angla, oni ricevas komplete aŭtentikan britan voĉaron. Kontraste, Esperanto, kvankam bone komprenebla kun adekvata prozodio kaj la necesa verv-ironia stilo, havas karakterize francan elparolon. La bendo ne ekspluatas la interaktivajn eblojn de stordiskoj, kaj ne havas instruan celon. Pedagogoj povus elkovi apogajn instruajn aktivaĵojn, sed la bendo, pro sia stilo, taŭgus nur ekde la mez-adoleska aĝo.

Ĝenerale la trakto de idiomoj estas bona. France kaj hispane la detektivo

reagas al dubinda rakonto: "tio havas nek kapon nek voston". Angle: "mi neniam aŭdis pli grandan kok-bovan rakonton." Esperanto prave liveras tion malpli pitoreske sed kun adekvata universaleco: "tio estas sen-sencaĵo." Ne ĉiam tiom glate iris: dubindaj estas la E-tradukoj "kuketa" (*F chou, A cute*), "ni klasas" (*F nous classons, A case closed*), "parkis en dua linio" (*A double parked, F en double file*).

La humuro de la antaŭlasta rakonto estas tre lingve bazita, moke al la modo je politike korekta parolado. Ĝi efikas amuze en la angla kaj franca, kie tiuj novaj esprim-manieroj (troe) evoluis, sed spertas problemojn konvinke adaptiĝi al Esperanto, ĉar tiu modo ĝin ne tuŝis. La plimulto de la ceteraj rakontoj bone funkcias kaj elvokas ridojn de tempo al tempo.

Ĉi tio estas brava unua iniciato, ja la baza verko estas profesi-nivela. Mankas akompana libreto, sed la programo estas post kelkaj eksperimentoj mem-klariga. Stor-diskoj ofertas al ni potencon novan interaktivan komunikilon — espereble aperos multaj pliaj, kun karaktero ne nur distra sed ankaŭ lerniga.

Stefan MacGill (Hungario)

Amuzlibro lerna

Mil unuaj vortoj en Esperanto. Heather Amery. Londono: E-Asocio de Britio, 1994. 62p. 31cm. Ilus. Stephen Cartwright. Bind. 31,50 gld.

La brita eldonejo Usborne, kiu faras lernolibrojn por infanoj, eldonas

popularan bildvortlibro-serion *The First Thousand Words* ("Mil unuaj vortoj"). Ĉi tiu serio jam haveblas en la naciaj lingvoj angla, franca, germana, hebrea, hispana, itala, japana kaj rusa. La Esperantan version aperigis Esperanto-Asocio de Britio. Ĝi estas identa al la aliaj krom foresto de la nomo Usborne. La anglalingvan

originalon verkis aŭtoro de multaj naturlibroj kaj dinosaŭrlibroj por infanoj. Eksplicita sciigo mankas pri la Esperanta tradukinto, kvankam povus esti Betty Root, la "konsultato" nomata sur la titolpaĝo.

La plej bona aĝo por lerni duan lingvon estas la infaneco, sed infanoj eniĝas rapide se ili ne estas distraĵoj. Tial bona lernolibro por infanoj devas esti ankaŭ amuzlibro. Tia libro estas *Mil unuaj vortoj en Esperanto*, ĉefe pro la ĉarmaj, humuroplenaj ilustraĵoj. La "mil vortoj", plejparte substantivoj, estas ordigitaj laŭteme. Ĉiu vorto havas sian propran bildeton, kaj multaj aperas ankaŭ en dupaĝaj panoramaj bildegoj. La temoj estas ĉiuj konataj al infanoj, ekz. la hejmo, la strato, la ludilbutiko, la bestoĝardeno, la cirko ktp. Infanoj ĝuos legi kaj relegi ĉi tiun bild-vortlibron kun siaj gepatroj aŭ instruistoj. Ĝi jam aperis sur la Tamperea furorlisto (ŝkt. '95, p. 174).

Howard R. Berman (Usono)



En ĉiu dupaĝa bildego troviĝas anaseto. Sed kie?

Frenezige por kliŝ-amantoj

La interna vivo de Esperanto. Eseoj. Karolo Piĉ (1920-1995). Saarbrücken: Iltis, 1995. 401p. 21cm. 74,40 gld.

Interlingvistiko, esperantologio en la aspektoj sociologia, lingva kaj literatura — superbas la eseo *Ab Catullus ĝis Schwartz* — konsistigas ĉi alte interese kaj sukan libron de la antaŭ nelonge forpasinta Karolo Piĉ, nomo nepre asociata al polemiko. Tiun ja la apero de ĉi verko ne dampos, sed certe kontribuos al pli senantaŭjuĝa pritakso de liaj lingvaj starpunktoj, multfoje pravaj kaj lucidaj, kvankam ĉiam ŝprucantaj el ekstrema pozicio. Jen la hiko.

Ja en sia nuna evolustadio Esperanto iel ekvatoras inter du polusoj de ekvilibro: skemismo kaj naturalismo. Kaj tia malfacila kompromiso, jam celita de Zamenhof mem, iluminas la paĝojn de la monumenta — malgraŭ ĉiaj malgraŭoj — PIV, kiun la genia aŭtoro de la epokfara romano *La Litomiŝla tombejo*, kvazaŭoficiala herezulo, taksas “la plej hereza volumo en la ĝisnuna historio de la lingvo, volumo antifundamenta, senpreceda kaj aregula, ia Malfundamento de Esperanto”. Ĉar por li “Esperanto *ne estas lingvo*, Esperanto estas mekanismo, maŝino, *aŭtomato*”, kaj “esperantaj vortoj similas al atomoj”. Nome, li lokas sin ekskluzive ĉe la aglutina poluso, kvankam, en kompara analizo pri diversaj planlingvoj, lia subkonscio jene lin perfidas: “Zamenhof sukcesis precipe pro la natura aspekto de la radikaro”. Tiupoluse li kontemplas la riĉigon de

nia lingvo surbaze de retroderivado: “nenio alia ol konsekvenca aplikado de la dua parto de la 15-a regulo”. Kaj tiel li povas frenezigi kliŝ-amantojn kiuj pro supra proksimiĝo al lia verkaro epitetas lin revolucia, per jena manifestiĝo de ekstrema konservativo, tamen tute kohera kun lia sinteno: “Esperanto *ne evoluas*, ĝi *eĉ ne povas, ne darf*as kaj *ne rajtas evolu*i, sed tiom pli ĝi devas, tiom pli ĝi devegas *antievolu*i!”

Fronte al produktoj strangaj kaj superfluaĵ — *aŭtem, tunk, solim, erst*. . . — la Piĉa sistemo liveras estimindajn kaj oportunajn rezultojn: la sufikson *-al*, vortojn kiel *paŭpera* ktp. La problemoj kuŝas en la absoluta validado kiun Piĉ pretendas por siaj principoj. Sistemo kaj ekstrema retroderivado kondukas al senfina vojo, ne sena je komplikoj, kontraŭdiroj kaj fremdigoj de formoj jam enradikiĝintaj senrimede. Lia troa spitemo kontraŭ la PIV-a propono pri *ora meza vojo* estigas pli da problemoj ol ĝi solvas. Kaj tion, verŝajne, li ĉiam pli konsciis, se juĝi laŭ jenaj dek jarojn distaj asertoj liaplumaj: “Kaj kiam, fine, estos al ni klare, ke aglutinismo-aŭtomatismo estas progreso, dum naturalismo estas la plej mizera degreso kaj eraro?” (*Perspektivoj de la Ilustralo*, 1978). “Bonŝance naturalismo kaj skemismo estas solim du vizaĝoj de unu sama Esperanto, ĝiaj ĉefaj elementoj, kiuj tage

nokte interfekundigas unu la alian, certigante tiel la vivon kaj daŭran progresadon de la lingvo” (*Urbi et Orbi*, 1988).

La interna vivo de Esperanto en-have, stile kaj debat-instige gravas. Ĝi lokas nin antaŭ iu Karolo Piĉ sendube surpriza por multaj legantoj: entuziasma pri la mesaĝo de Esperanto, optimisma — foje eĉ troe — pri ties futuro, zorga pri ties esencoj kaj paladine fervora pri nia populara literaturo.

Miguel Fernández (Hispanio)

GLOSJO

darfi: esti libera, povi (fari ion)

degreso: retropaŝo

biko: malfacila punkto, problemkerno

lucida: klarvida

solim: nur, sole, nure

Praktikaj konsiloj

Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj. Petr Chrdle. Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 40p. 20cm. 3,90 gld.

En prelego dum kolokvo de la Akademio pri “La stato kaj estonteco de Esperanto” (Prago, 1994), kiun li nun eldonis en plaĉa broŝuro, la aŭtoro priskribis proprajn spertojn, en sistema kadro, pri du ekonomiaj branĉoj kiuj estas pli facile alireblaj por komercantaj esperantistoj: eldono kaj turismo. Chrdle ne prezentas teoriojn, sed montras la merkatan praktikon. Tial lia libreto enhavas valorajn konsilojn. La praktikema Chrdle ne predikas belajn esperojn, sed ankriĝas en la realo, eĉ kiam tio sonas malagrabla en esperantistaj oreloj. Kompreneble Esperanto alportas jurajn problemojn se ĝi estas la lingvo de negoca kontrakto: kiu tribunalo postekzamenos ĝiajn klaŭzojn? Pli bone lerni ĉe Chrdle kiel preteriri tiujn malfacilaĵojn ol poste suferi malavantaĝojn. La maldika libreto ne povas vaste priskribi sian temon. Estas necese akumuli pli da spertoj pri komercado per Esperanto. Bonvena estas la kontribuado de Chrdle, prilumanta interesajn facetojn, al tiu ampleksa temo.

D-ro Werner Bormann (Germanio)

Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.

Laste aperis



Asteriks kaj la normanoj (1967). Goscinny. Desegnis Uderzo. El la franca trad. Nedeljko Korasić. Zagreb: Izvori, 1996. 48p. ISBN 953-6157-25-X. 29cm. Laŭvica bildrakonta aventuro de la neobeigeblaj gaŭloj. 16,80 gld.

Esperanto-movado: historio, organizo, amplekso, La. Dua, reviziita kaj kompletigita eldono. Carl Stöp-Bowitz (1913). Oslo: Esperantoforlaget, 1996. 93p. ISBN 82-90006-10-1. 21cm. Kompendio por ekzamenaj kandidatoj. Kun aparta ĉapitro pri la norvega E-movado. 18,00 gld.

Esplor-kreiva vojo, La. Wil Knibbeler. Esperanto-versio de Oene Hoekstra. Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri E-o, 1996. 25p. 30cm. Apliko de humanisma lingvoinstrua modelo al Esperanto. 9,90 gld.

Esperanto minimum szótár. Géza Kurucz (1936). Zalaegerszeg: Sikervonal Egyesület, 1995. 36p. ISBN 963-04-5254-5. 15cm. Esperanta-hungara vortareto de la 1237 plej oftaj vortoj. 4,50 gld.

Gvidlibro pri Esperanto-movado en Azio. Kompilis Doi Ĉieko. Jokohamo: Mevo-Libro, 1995. 90p. 21cm. Prezento de la E-movado en 43 aziaj landoj, kun mapoj, adresoj kaj aliaj utilaj indikoj. 12,00 gld.

Kapti ŝteliston. Adaptis Gu Zhongjin. Pentris Chao Xidi. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 20p. ISBN 7-5052-0192-1. 21cm. Bildlibro. Saĝa infano malkaŝas ŝteliston. 3,90 gld.

Kiso, La; kaj dek tri aliaj noveloj (1894-1924). Hjalmar Söderberg (1869-1941). El la sveda trad. Sten Johansson. Skövde: Alfab-et-o, 1995. 56p. 21cm. De Stokholma verkisto siatempe klasita kiel "deloganto de l'junularo", daŭre legata de svedaj gejunuloj. 10,50 gld.

Knabino estas mia, La. Dua volumo. NZANIYE Jesse Le-Prince (1960). La aŭtoro, 1995. 55p. 21cm. Daŭrigo de la unua E-teatraĵo el Afriko: pri konfliktoj inter du geedzoj. 7,20 gld.

Manĝomilito, La. Kerby Waud kaj David Lapp. Port Stanley: la aŭtoroj, 1994. 12p. 19cm. Ĉarme naŭva bildrakonta parabolo pri konkurenco kaj kunlaboro. 6,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Nobela novelaro. Sep noveloj de tri svedaj nobelpremiitoj (1919-34). Pär Lagerkvist (1891-1974), Eyvind Johnson (1900-76), Harry Martinson (1904-78). El la sveda trad. Sten Johansson. Skövde: Alfab-et-o, 1995. 60p. 21cm. 10,50 gld.

Pesi elefanton; Saĝa Huang Wan. Adaptis Gu Zhongjin. Pentris Sha Gengshi. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 20p. ISBN 7-5052-0187-5. 21cm. Bildlibro. Infanoj brile solvas du fizikajn problemojn. 3,90 gld.

Rateto volas edziniĝi. Ĉinaj popolaraj rakontoj. Komp. Zhao Muying. El la ĉina trad. Shan Ren. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1995. 60p. ISBN 7-5052-0138-7. 18cm. Dek unu rakontoj pri la deveno, karakterizaĵoj kaj majstroj de diversaj metioj. 12,00 gld.



Plonĝu bele tre en la ĉinan kulturon per *Ruĝdoma sonĝo*, aŭ filologe en la eŭropan per fama Eco-verko — du ampleksaj kaj belaj novaĵoj de la monato.

Roma Meslibro: Meslibro por dimanĉoj kaj festoj; Legaĵaro por dimanĉoj kaj festoj. El la latina trad. Liturgia Komisiono Internacia. Vatikano: Libreria Editrice Vaticana, 1995. 214 + 686p. ISBN 88-209-2080-8. 24cm. Dukolora preso. Bind. 5 legrubandoj. Aŭtenta eldono por liturgia uzo. 198,00 gld.

Ruĝdoma sonĝo. Volumo 1. Cao Xueqin (1724-1764). El la ĉina trad. Xie Yuming. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1995. 16+582p. ISBN 7-5052-0235-9. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Aŭtobiografia verko pri ruiniĝo de nobela familio kaj tragedio de junaj geamantoj. Laŭ komuna agnosko, la plej grava ĉina romano. Volumoj 2 kaj 3 aperos en 1996 resp. 1997. 42,00 gld.

Serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo, La (1993). Umberto Eco (1932). El la itala trad. Daniele Mistretta. Pisa: Edistudio, 1996. 317p. ISBN 88-7036-064-4. 21cm. Prezento de la multspecaj provoj krei, rekrei aŭ retrovi lingvon filozofie pli taŭgan ol la "naturaj" lingvoj. Kun tre pozitiva ĉapitro pri Esperanto kaj pri la eblo de internacia helplingvo. 36,00 gld.

Stokita vino. Rakontoj. Poul Thorsen (1915). Pisa: Edistudio, 1996. 103p. ISBN 88-7036-066-0. 21cm. Kelkpaĝaj prozaĵoj inspiritaj de vojaĝoj en sepdek-kelkaj landoj. Premiita de Esperantlingva Verkista Asocio. 24,00 gld.


Tempo tempesta. Poemoj el jardeko (1985-1995) kaj Dek jarojn esperantisto. Franz-Georg Rössler (1949). Ilustris Rita Rössler. Antwerpen: FEL, 1995. 24p. ISBN 90-71205-63-0. 21cm. Poezia kaj aŭtobiografia resumo de dek jaroj kiel esperantisto. 6,90 gld.

Vivprotokoloj 1. Redaktis Ulrich Becker. Intervjuis kaj prilaboris Zdravka Metz kaj Ulrich Becker. Berlin: Monda Kunagado kaj Kulturring in Berlin, 1995. 88p. 21cm. Vivrakontoj de 13 "simplaj" esperantistoj, redaktitaj laŭ magnetofonaj intervjuoj. 7,80 gld.

DIVERSAĴOJ

Vidbendoj:

Ega kesteto, La. Polica filmo 7-lingva. Reĝisoris Francisko Randin. Scenaro de Dan Nir. Dialogoj de Johán Valano. Rolantoj: A. Bickel, A. Favre, N. Margot k.m.a. esperantistoj. Lausanne: Nandir Filmoj, 1995. 30 min.



VHS(PAL/SECAM), NTSC. Krimhistorio kun lingva komunikproblemo kiel fono. Kun Esperantaj subtitoloj. 66,00 gld.

Kongresa filmo. 80-a UK de Esperanto, Tampere 1995. Lausanne: Nandir Filmoj, 1995. 60 min. VHS(PAL/SECAM), NTSC. Kompleta trarigardo de la programeroj, de inaŭguro ĝis fermo, tra artaj eventoj, balo, aŭkcio ktp. 66,00 gld.


Laŭzana polico prezentas sin, La. Reĝisoris Francisko Randin. Komentoj legitaj de Dan Nir. Kun lingva helpo de Johán Valano. Lausanne: Nandir Filmoj, 1995. 30 min. VHS(PAL/SECAM), NTSC. Pri la polica laboro en la kvina plej granda urbo de Svislando. 66,00 gld.

Ĉiuj veraj esperantistoj
abonas al la plej ofta E-gazeto

EVENTOJ

Ĉu ankaŭ vi?

pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario



Preparu manĝon ankaŭ por alia



Ofte modernaĵoj kreskas en Okcidento kaj fluas al aliaj mondo-partoj. Multaj el ili estas bonaj, sed atingas nur duonsukcese la Trian Mondon.

Ekzemple, post la alporto de edukado, kristanismo kaj islamo al Niĝerio, oni lasis ilian evoluon al la popolo, kiu ankoraŭ ne spertis pri ili. Tial oni ankoraŭ ne tute akceptas ilin.

Unu okcidenta modernaĵo estas Esperanto, kies konon oni penegas disvastigi tutmonde. Tamen iu ajn povas rekoni ke en la Tria Mondo ĝi ne kreskas same rapide kiel en riĉaj landoj. Ĉu la kondiĉoj en la Tria Mondo ne

malhelpas la grandan revon ke Esperanto iĝu la monda lingvo komuna?

Antaŭ kvar jaroj mi ekstudis Esperanton, sed mi neniam renkontis esperantiston. Pro la sendokostoj mi ne povas kontakti multajn (eĉ enlandajn) samideanojn. Fortajn E-grupojn ni ne havas. Al iu samlandano mi iam letere konfesis ke mi ne estas certa ĉu kiuj leteris al mi, ne estas fantomoj. Dank' al TEJO, mi senkoste kaj ĝustatempe ricevas la revuojn *Kontakto* kaj *Esperanto*. Radio Aŭstrio foje sendas al mi presaĵojn. Tamen, multaj informoj atingas min kun prokrasto.

La menciitaj problemoj ne estas nur miaj, sed oftaj en la Tria Mondo. Kiel ĉesigi ilin? Jen kelkaj solvopropoj:

- Estus bone starigi studgrupojn kun dungitaj instruistoj. Mi kaj multaj

aliaj studis Esperanton koresponde, kio havas siajn malavantaĝojn: malrapida lernado, mallerteco en la parolo.

- Ne malpi gravas fondi Esperanto-grupojn, por antaŭenigi niajn aferojn kaj perfektigi en la lingvo.
 - Kiu ajn peto de pago senkuraĝigas la homojn en la Tria Mondo. Senkoste sendataj gazetoj kaj presaĵoj helpegas nin. Pagipovuloj bonvole donacu monon por tiu celo.
 - Oni kongresu en la Tria Mondo.
 - Helpu pagi, parte aŭ tute, ĉeestokotizojn en kongresoj, por ke triamondanoj vidu kiel viva estas Esperanto. Indas ke en la UK-oj ĉeestu reprezentanto de ĉiu lando.
 - Korespondu kun triamondanoj, por ke ili ne restu solaj en sia medio.
- Ne eblas listigi ĉiujn problemojn kaj solvojn. Pli helpas apliki nur unu el la ĉi-supraj proponoj ol farbi tutan gazetpaĝon per listo da ili. Kion fari por ke la situacio triamonda ne malrapidigu, eĉ malhelpu, la deziron esperantigi la mondon? Konsideru popoldiron el mia lando: "Por helpi sin kontraŭ malsato, manĝemulo preparu manĝon ankaŭ por alia alvenonto."

ŬSHŬ-DAVIES Olúwábùnmí (Niĝerio)



KULTURA ESPERANTO-DOMO
GRÉSILLON - F-49150 BAUGÉ
telefono : 41 89 10 34

Somera Programo por 1996

- 20/06 - 06/07 Kursoj por komencantoj kaj lertuloj
- 07/07 - 13/07 Kursoj por komencantoj (1-a parto) kaj praktikantoj
Preparado al la Atesto pri Kapableco (ekzameno de Franca Esperanto-Instituto).
Studo de la franca lingvo pere de Esperanto.
- 14/07 - 21/07 Kursoj por komencantoj (2-a parto), praktikantoj kaj lertuloj
- 21/07 - 28/07 Kursoj por komencantoj (1-a parto) kaj praktikantoj
"Studado de la gramatiko"
(André Cherpillod).
- 28/07 - 04/08 Kursoj por komencantoj (2-a parto) kaj praktikantoj
"La arto traduki" (Georges Lagrange).
- 04/08 - 11/08 Kursoj por komencantoj (1-a parto), praktikantoj kaj lertuloj
- 11/08 - 18/08 Kursoj por komencantoj (2-a parto) kaj praktikantoj
- 18/08 - 25/08 Kursoj por praktikantoj kaj lertuloj

La Kultura Esperanto-Domo estis fondita en 1951. La kastelo Grésillon staras meze de 18-hektara parko. Tie estas proponataj, ĉiujare, kursoj, prelegoj, distraĵoj, ekskursoj en internacia etoso. La ĉeestantoj disponas bibliotekon kaj libro-servon. Pli detala programo estas havebla kontraŭ respond-kupono aŭ aŭfrankita koverto.

La deksepa regulo



Pasintjare, dum unu el ni-aj kutimaj asociaj renkontiĝoj, mi proponis etan enketon al la ĉeestantoj: "Kiel, laŭ vi, devus esti envortigita la 17-a regulo de la Fundamento?"

Kompreneble, ni ĉiuj scias ke estas nur 16 reguloj en la Fundamento, kaj mi ne vidas bezonon reformi la lingvon. Mi celis alian aferon.

Kvankam la Dekalogo konsistas el nur 10 ordonoj, ni kubanoj kelkfoje aldonas unu plian: "Ne kibicu". Ankaŭ: laŭ *Kontakto*, por brazilaj esperantistoj la 17-a regulo tekstas: "Edzino ne parolas Esperanton". Nu, temas pri ŝercoj, sed ili esprimas veron. Ankaŭ mi celis ke oni esprimu pere de frazo simpla kaj trafa, tamen ŝerca, konstaton pri bedaŭrindaj aspektoj de nia Esperanta vivo.

La respondoj gamis disde admona ("Ne parolu Esperanton per manĝoplena buŝo") ĝis konstata ("Kiam mi parolas Esperanton, neniu komprenas min"). La ekzerco, kvankam el ĝi fontis sana rido, vekis atenton ĉe la plej seriozaj ĉeestantoj: "Ĉu vere ni havas tiom da problemoj?"

Eble ni ĉiuj devus mediti pri la afero. Sed, bonvolu, strebu ne eltrovi pli ol 17 regulojn...

Alberto García Fumero (Kubo)



• Danio: KEF promesas multon

La programo de la Kvina Kultura E-Festivalo (KEF, 6-11 aŭgusto, Kopenhago) konstante pliriĉiĝas. Anoncis sian venon jenaj muzikistoj: Jomart kaj Nataša, Ĵak Le Puil, Kajto, la rok-grupoj Persone, Tutti Futti (Francio), Brokantaĵo (Danio/Bosnio, kun malnovaj kantoj de Amplifiki); la sambisto Flavio Fonseca kun sia orkestro (Brazilo), Denis Rock kaj lia grupo Survivors (Zairio), la funk-grupo Freemagnozhou (Zairio/Francio), kaj la kaĵun-cigana triopo Leclercq (Francio).

En literatura kafejo ĉeestos la verkistoj István Nemere, Spomenka Štimec kaj Poul Thorsen. La 100-jaran jubileon de la Esperanta teatro KEF celebros per prezentoj de f-ino Barlaston, Jerzy Fornal kaj Tomás Plaszky. Malferma scenejo, korusa kaj artista metiejoj, Interreta kafejo, infana angulo, senpaga eniro al la amuzparko Tivoli, al Nordselanda Somerparko kaj al muzeo de vikingaj ŝipoj promesas ĝuindajn tagojn ankaŭ al neparolantoj de Esperanto. Eblas ankaŭ lingvokursi kaj partopreni ekzamenon de UEA/ILEI. Informoj: Jacob Nordfalk (Radmandsgade 53, 2. th., DK-2200 København Ø; ☎ +45/31-83-82-20; ✉ nordfalk@fys.ku.dk).

• Britio: EKo-Fonduso

La nova brita grupo EKo-Fonduso (p/a Brian Burnett, Nant-yr-Hafod Cottage, Llandegla, Wrexham, Clwyd LL11 3BG, Kimrio, Britio) celas kreskigi la fidon de esperantistoj pri sia propra lingvo kaj ties komerca valoro. Inter ĝiaj 14 fundamentaj principoj estas: malalta kotizo por membroj kaj subtenantoj; pago al varbinto de nova membro; profitdoneco de ĉiuj ĝiaj projektoj; uzo de ĉiuj enspezoj por kreskigi la membraron; moderneco de reklamaj kaj instruaj materialoj.

• Ĉeĥio: Dividendoj por E-asocio

En 1992 Ĉeĥa E-Asocio ofertis al siaj membroj kovron de iliaj elspezoj por aĉeti la t.n. kuponan libreton, per kiu, kadre de la “kupona privatigo” en Ĉeĥio, aĉetebis akcioj. Kompense, la membroj devis donaci duonon de la akiritaj akcioj al ĈEA — interŝange por dumviva membreco kaj por libera elekto, je 400-krona valoro, el la asocia varstoko. Nun, kiam ĉiuj 36 donacantoj transdonis siajn akciojn, ĈEA povas konstati ke la koncernaj kostoj sumiĝas al ĉ. 50 mil kronoj (ĉ. 30 mil gld.), dum la unuaj dividendoj en 1995 atingas 7 mil kronojn (ĉ. 425 gld.). Atendeble, post kelkaj jaroj realiĝos la origina celo buĝet-firmiga. (Starto)

• Ĉeĥio-Pollando: Komenio-Zamenhof

Laŭ propono de Ladislav Fiala al la ministerio de Ĉeĥio pri eksteraj aferoj, la Ĉeĥa Kultura Centro en Varsovio aranĝos ekspozicion “De Komenio al Zamenhof” de la 27-a de marto ĝis la 14-a de aprilo 1997. Kunlaboras pri ĝia realigo Asocio de Handikapitaj E-istoj, Pola E-Asocio kaj Muzeo de Komenio (Přerov, Ĉeĥio). Memore al la forpaso de Zamenhof antaŭ 80 jaroj, la kulturcentro organizos ciklon de akompanaj prelegoj, koncertoj kaj filmprezentoj. Oni intencas aranĝi la saman ekspozicion ankaŭ en alilandaj ĉeĥaj kulturcentroj. Informas: Ladislav Fiala, Fügnerova 28/18, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio.



• Ukrainio: Omaĝo al pioniro

Mihajlo Jurkiv, aŭtoro de la unua E-lernolibro por ukrainoj (1907), ricevis memortabulon en Ternopil, la urbo kie li vivis (vd. supre). La bareliefo de Ivan Sonsjadlo montras la E-pioniron en kadro de la jubilea simbolo, sur kiu estas ĉizitaj frazeroj en diversaj alfabetoj. (V. Pajuk)

• Svedio: La bela lingvo

Spomenka Štimec, Otto Prytz, Sten Johansson, Jon Rømmesmo kaj Anne Sofie Robinson prilumis por kvindekda partoprenantoj la temon “La bela lingvo” en la jarkunveno de Sveda E-Instituto (Karlskoga, 23-24 marto). Natalja Berce kaj Oksana Kurpekova helpis per siaj gitaroj al la bona etoso.

• Norvegio:

Grava celgrupo senscia

Kiel notite (nov., p. 198), unu el la strategiaj celoj de Norvega E-Ligo estas ke ĝis 2000 la plimulto de la norvegoj sciu ke Esperanto estas lingvo. Laŭ profesia enketo mendita de NEL, tiu celo estas jam atingita: 59% de la norvegoj scias pri la lingveco de Esperanto. Tamen, nur 5% el ĉi tiuj 59% konsideras ĝin “tre utila”; la plej grava celgrupo, la junularo, estas proporcie plej senscia kaj plej malfavora. (Norvega Esperantisto)

• Rusio: Jakutio, Karelio

En Jakutio aktivas E-grupo: Jakutska Esperanto-Grupo, p/a Vladimir D. Okopnij, P.f. 1 “OVLAD”, RU-678953 Tommot-1, Saĥa-Jakutio, Ruslando. Ĝi aperigis artikolon (23 dec.) en gazeto de la urbo Aldan, *Aldanskij Raboĉij*.

En la urba parlamento de Petrozavodsk, ĉefurbo de Karelio, inter la ses deputitoj de la patriota-komunista frakcio “Alternativo” estas du esperantistoj: Aleksej Mosunov kaj Aleksandr Merkušev. (Ruslanda Esperantisto)

• Svislando: Piron-vidbendo

40 personoj aŭskultis prelegon de Claude Piron la 15-an de februaro, en libertempa centro Ĝeneva. La saman tagon artikolo aperis en *Journal de Genève*: “Fervora adepto de Esperanto parolas ĉi-vespere en Ĝenevo (franclingve)”. La prelego estis filmita; la vidbendo akireblas ĉe Dannir Productions Vidéo, C.P. 1258, CH-1001 Lausanne. (Brasikfolio)

Per- sone



• Olmos: Ne al glavo

La esperantisto Angel Olmos (Alt-sasu, Eŭskio, Hispanio) estis arestita kaj enprizonigita dum kelkaj tagoj en novembro, pro rifuzo militservi. Nuntempe li devas nur tranokti en malliberejo, sed tiu puno daŭros entute pli ol jaron. Por informoj kaj subtenleteroj turnu vin al: Eŭska E-Asocio, Zapateria 29, ES-01001 Gasteiz, Araba, Hispanio. (*Kuspe, Laŭte!*)

• Robineau: Tra la mondo iris

Nia revuo plurfoje raportis pri la okjara, parte per-Esperanta vojaĝo ĉirkaŭmonda de la franca paro Maryvonne kaj Bruno Robineau, kiuj spertis

proprahaŭte la vivon de agrikulturistoj en dekoj da landoj. Adoptinte la bolivian infanon Vincent, ili revenis en 1993 al Francio kaj baldaŭ eldonis la franglingvan libron "Kaj ilia vivo estas la tero" pri siaj vojaĝoj. Ili preparis profesion prelegon kaj turneas kun ĝi en kulturcentroj kaj lernejoj de Francio kaj Belgio. La publiko ĉiam ricevas lerte dozitajn informojn pri Esperanto kaj pri la ebloj ĝin lerni. Kontaktu: Robineau, 10 rue d'Anjou, FR-49270 Landemont, Francio.



• Selten: Nia diligenta kolego

Laŭ iniciato de d-ro José Luis Pérez Óvilo, delegito en Murcia (Hispanio), la loka universitato invitis la esperantistan Nobel-premiiton Reinhard Selten por seminarii kaj prelegi (4-6 marto) kadre de studotagoj pri la ludo-teorio. La du seminarioj de Selten okazis en la angla, sed la finan prelegon li faris en Esperanto, kun samtempa traduko en la hispanan.

• Wandel:

Sur neŭtrala lingva fundamento

Post partopreno en internacia scienca konferenco en Tokio, estrarano Amri Wandel vizitis en marto plurajn movadajn centrojn en Japanio. Anonco en la plej legata Tokia taggazeto allogis dekojn da neesperantistoj al Japana E-Instituto por lia publika E-lingva prelego, "Ĉu ekzistas vivo ekstertera?" Krome Wandel vizitis la E-grupojn de Nagojo, Osako kaj Kioto, kaj prelegis ĉe Kansaja Ligo de E-Grupoj kaj Oomoto.

Fake



• Bibliotekoj: Konsultu komputile

Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, la plej granda plene funkcia E-biblioteko, katalogas siajn nove akiritajn librojn rekte en la komputila reto de la Aŭstria Nacia Biblioteko, al kiu ĝi apartenas. Tio signifas ke per Interreto oni povas rekte konsulti multajn titolojn de IEM. Tamen, la katalogado de la tuta libraro daŭros ankoraŭ kelkajn jarojn. (IEM) La katalogo de Germana E-Biblioteko en Aalen (9000 registraĵoj) estas legebla, ankaŭ kun serĉfunkcio, ĉe: <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/aalen>. Informoj pri E-bibliotekoj ĝenerale: <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/veb/bibl.html>. (M. Weichert)

Akceptinte duonon de la ĉ. 1200-voluma postlasaĵo de la verkisto kaj instruisto Boris Tokarev, Moskva Biblioteko de Fremdlingva Literaturo posedas nun la plej grandan E-kolekton el ĉiuj rusiaj publikaj bibliotekoj. (*Ruslanda Esperantisto*)

• Biciklado: Kune en Ĉeĥio

La 70-jara Oldřich Schwetter (Sadová 7, CZ-73601 Havířov-Město, Ĉeĥio) alvokas ĉiujn esperantistojn-biciklistojn aliĝi al lia biciklado el lia hejmurbo Havířov al Prago (360 km-oj) kaj al bicikla propagando tra Prago dum la UK.

• Blinduloj: Registritaj en Rusio

Post dujara klopodo, la Rusia E-Asocio de Nevidantoj estis jure registrita kiel ne-profitcela organizaĵo. REAN atendas proponojn pri kunlaboro kaj pri mecenatoj: p/a Anatolij Masenko, Gerojev-Medikov 15-1, RU-357739 Kislovodsk, Rusio. (*Ruslanda Esperantisto*)

• Ĵurnalismo: Cent Eventoj

La dusemajna gazeto *Eventoj* (Eldonejo Lingvostudio, Pk. 87, HU-1675 Budapeŝto, Hungario), lanĉita en marto 1992, gratulinde atingis en aprilo sian centan numeron. Krom regula kaj ofta informado, *Eventoj* helpas la agadon de e-istoj per diversaj servoj, i.a. per ellaboro de E-literaro por IBM- kaj Makintoŝ-kongruaj komputiloj; senpagaj anoncoj; kompilado de utilaj listoj, kiel la publike atingebla, konstante aktualigata listo de ĉiuj E-aranĝoj.

• Katolikismo: Invito al 2000

La E-Grupo G. Canuto (p/a Vittorio kaj Luisa Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, Italio) petas sendi leterojn, ekspoziciotajn, al la episkopo de Parma, Benito Cocchi (p/a Parma Episkopejo, Piazza Duomo, IT-43100 Parma), kiu pretas enkonduki ĉiunmonatan E-lingvan meson. La grupo instigas ke aliaj esperantistoj simile prezentu la eblojn de Esperanto al katolikaj ĉefpastroj, kaj invitas pilgrimontojn al Romo en la jubilea jaro 2000 halti en la vizitindaj urboj Parmo kaj Asizo.

• Liberecanoj: Sindikatoj por E-o

Dum sia lastjara konferenco, la germana liberecana sindikato Freie ArbeiterInnen-Union akceptis du peticojn favore al Esperanto. Instigite de tio, la hispana liberecana sindikato CNT decidis same. (*Panoramo-Info*)

• Lingvistiko: Svisa kolokvo

En la kolokvo "La lingvo kaj ties bildoj" (6-8 marto, Universitato de Neuchâtel, Svislando) pri E-rilataj temoj prelegis Lilli Papaloizos kaj Claude Piron. Pri la lingvaj aspektoj de klas-interŝanĝoj en Svislando parolis esperantistino Mireille Grosjean. (*Eventoj*)

• **Literaturo: Persona elirvojo**

En la marta numero de *Van taal tot taal* ("De lingvo al lingvo"), la organo de la Nederlanda Asocio de Tradukistoj, aperis artikolo de Willem Verloren van Themaat ("Persona elirvojo el lingva konflikto") pri la poeto Edwin de Kock, kiu lernis Esperanton por fari ĝin sia verkilo. (W. Verloren van Themaat)

• **Scienco:**

Premio Pirlot al Galajĉuk

La senato de Akademio Internacia de la Sciencoj aljuĝis la ĉi-jaran Premion Pirlot al la ukraina medicinisto Igor Galajĉuk, pro la redakto de la kongresvolumo *10-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco. Sciencaj resumoj* (7,50 gld. ĉe UEA). La Premio Pirlot estas ĉiujare atribuita, ekde 1994, al scienca verko kies enhavo estas almenaŭ duone en Esperanto. (AIS)

• **Terminologio: Serbaj fervojistoj**

Jugoslavia Asocio de Fervojistoj-E-istoj eldonis dudirektan serban-Esperantan *Fervojfaka terminologio* (10 200 terminoj, 219 paĝoj A4). Ĝi baziĝas sur la kvara komplete reviziita "Leksikono de la Internacia Fervojunio (UIC)". (*Eventoj*)

• **Tradukado: Hispana konkurso**

Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluzia E-Unuiĝo kune organizas beletran tradukan konkurson pri hispanigo de originalaj Esperantaj verkoj. Oni rajtas konkursi per maks. tri tradukoj, sendantaj antaŭ la 31-a de oktobro. Detalaj informoj: AEU, Apartado 3275, ES-29080 Málaga, Hispanio. (*Gazeto Andaluza*)

ANONCETOJ

20-jara studentino de la angla dez. kor. tm. pri ĉ.t. en E-o kaj la angla. F-ino Zahra Rangchi, No 25, Farhang Str., IR-65159 Hamedan, Irano.

Retpoŝta adreso de Brazilia E-Ligo: bel@brnet.com.br.

50-jara polo deziras korespondi tutmonde: Zygmunt Skiba, ul. Malista 11/B5, PL-44-207 Rybnik, Pollando.

Vizitu Maastricht Esperanto-Domo: tranoktado 35 gld pp fakso/tel +31-43-213.247; retpoŝto Adriaanse@GVO.RuLimburg.nl.

INTERVJOO

La ĉemizoj de Paĉjo Kristnasko

Amarílio Hevia de Carvalho estas konata en tuta Brazilo kiel la "Esperanto-ĉemizisto". Franĉjo Veuthey intervjuis lin dum la Paranaa Renkontiĝo, en pasinta decembro.

Kial vi estas ĉemizisto?

En 1981, kiam la 66-a Universala Kongreso okazis en Braziljo, mi bombardis la gazetaron per dekoj, centoj da presaĵoj pri nia UK. La gazetaro reagis per giganta silento en ĉiuj ĉefaj urboj de Brazilo. Kiam mia nevo Min-go konstatis ke mi ege malĝojiĝis pro tiu silento, li entuziasmigis min per la ideo: "Onklo, ni disvastigu Esperanton per ĉemizoj surstrate, ĉe universitatoj..." Laŭ la metodo serigrafia li komencis presi T-ĉemizojn por ke mi disvendu ilin. Kiam li baldaŭ ekstudis en universitato, mi mem ekpresis la ĉemizojn kaj ekvojaĝis kun ili tra la lando.

mi preferas la universitatan medion.

Ĉu la homoj demandas pri la lingvo, aŭ simple trovas ĝin amuza?

Ili volonte ricevas ĝustan, trafan informon pri Esperanto kaj petas de mi prospekton.


Kiu desegnas la motivojn por viaj ĉemizoj?

Laŭ la diraĵo: nenion oni kreas, nur imitas kaj kopias... Do, mi multe kopias, prenas desegnaĵojn kaj fotojn el revuoj, kaj mem aranĝas la tuton.

Ĉu viaj ĉemizoj bone disvendiĝas?

Se oni presas allogan bildon sur altnivelan ĉemizon, de la tutmonde konata brazila marko Hering, la disvendado estas ege facila. Tamen,

Foto: Franĉjo Veuthey



Ĉu vi jam estis emerito tiam?

Mi emeritiĝis antaŭ longe. Iuj brazilanoj forlasas la laboron por vagabondi, sed ĉe mi okazis kontraŭe: mi ek-vagabondis por labori. Mi vojaĝas tra Brazilo disvendante ĉemizojn je prezo de banano [= bagatela prezo], en la stratoj kaj ĉefaj placoj de pluraj brazilaj urboj.

Ĉu viaj ĉemizoj ĉiam havas nur Esperantan tekston?

Kelkaj tekstas en la portugala; unu surhavas la vortojn "Esperanto - lingvo internacia" en 27 lingvoj.

Ĉu vi havas iun preferatan medion por vendi?

Foje mi vendas sur plaĝoj, sed

kelkaj homoj trovas miajn prezojn altaj, aliaj ne. Lastatempe, en oktobra konferenco pri E-instruado en Campos de Jordão, okazis vera miraklo: disvendiĝis facile 150 ĉemizoj.

En la lastaj jaroj vi kutimas en decembro alvestiĝi en Jul-avon. Ĉu tio iel rilatas al la ĉemizo-komerc?

Subite, antaŭ tri jaroj mi sentis kva-zaŭ misteran ordonon: fariĝu Paĉjo Kristnasko, disdonu surstrate sukerajojn al infanoj! Ekzemple, antaŭ-hieraŭ mi vizitis la paragvajan urbon Ciudad del Este: tie atendadis min, kun malpuraj manoj, dekoj kaj dekoj da infanoj ege malriĉaj, kiuj laboregas por sin vivteni. Mi fortege emociiĝis. ★

Lennart ÅBERG (1912-1996), unu el la plej konataj svedaj e-istoj, honora membro de Sveda E-Federacio, mortis antaŭ nelonge en Gotenburgo, kie li animis — precipe en la 70-aj jaroj — la agadgrupon Inter. Esperantisto ekde 1934 kaj ĉiam membro unue de Internacia E-Ligo, poste de UEA, dum pli ol 30 jaroj delegito pri E-informado, turismo kaj UN-aferoj, li longe prezidis la klubon en Skövde, motoris la svedajn kongresojn en tiu urbo (1939, 1949, 1956), gvidis sennombrajn kursojn, kaj organizis multajn aranĝojn kaj prelegvojaĝojn por eksterlandaj esperantistoj.



Lennart Åberg

Dino FABRIS (1917-1996) mortis la 13-an de marto. Prezidanto (1967-77) kaj ĝenerala direktoro (1977-96) de Itala E-Instituto, delegito en Cittadella apud Padovo 40 jarojn, poste ankaŭ fakdelegito pri ĵurnalismo kaj Rotario, li ĉefe agadis en la ĵurnalisma kampo, kiel sekretario (1958-91) kaj kasisto (1958-95) de Tutmonda E-ista Ĵurna-

lista Asocio, kiu elektis lin honora membro en la Tampere UK. Dum multaj jaroj Fabris administris TEĴA sub tre malfacilaj cirkonstancoj, dum la cetera estraro sidis en Bulgario.

Aleksandr KOROLEVIĈ (1913-1995), E-instruinto, klubestro, komisionano pri renovigo de la E-movado en 1964, aŭtoro de la ruslingva *Libro pri Esperanto* (1989, 20 mil ekzempleroj) kaj de E-ukraina konversacilibro (1993), mortis fine de la jaro en Lviv (Ukrainio).

Anastasio LÓPEZ LUNA (1914-1995), dumviva membro, aŭtoro de prozaĵoj kaj teatraĵoj en la hispana kaj Esperanto, forpasis la 3-an de aŭgusto en Valentin Alsina (Argentino). En Esperanto li aperigis duoncenton da volumoj, sed lia plej legata verko restas eble la hispanlingva *Zamenhof, iniciador de Esperanto* (1948), tradukita en plurajn lingvojn.

NAGAOKA Zirô (1923-1996), delegito en Sagae (Japanio), prezidinto de Nord-Orienta E-Ligo, redaktoro de la revuo *Verda Sanatorio* (1957-80), mortis la 23-an de marto.

Gustav NYGÅRD (1922-1995), delegito pri maristaj aferoj en Gotenburgo (Svedio), ano de Societo Zamenhof kaj dumviva membro, mortis antaŭ nelonge.

Tadeusz PLESKACZYŃSKI (1909-1996), delegito pri arkitekturo kaj turismo de 1957, delegito de Varsovio ekde 1984, forpasis la 6-an de februaro.

Miloslav RIBÝN (1926-1995), delegito en Liptovský Mikuláš (Slovakio) kaj instruisto, forpasis la 11-an de novembro.

Vladimír ROTREKL (1923-1995), klubprezidinto kaj delegito en Znojmo (Ĉeĥio), delegito pri turismo, Esperanto-instruinto, forpasis la 13-an de oktobro.

Wil SMIT (1901-1995), plurfoja premiinto en Belartaj Konkursoj, iama delegito en Amersfoort (Nederlando), mortis en decembro.

Aleksandrs STRAUTMANIS (1912-1995), kies arkivo de movadaj fotoj (pli ol 14 mil negativoj) estas gardata en la Esperanto-centro de Kaunas, mortis la 5-an de oktobro en Rigo (Latvio).

Boris TJUTRIN (1947-1996), kreinto kaj unua prezidinto de la klubo en Niĵnij Tagil (Rusio), forpasis la 10-an de januaro.

Kenneth TWINN (1910-1996), unitaria pastro, forpasis la 30-an de januaro en Ditchling. Seninterrompe membro de UEA ekde 1937 kaj delegito de 1940 (pri lingvoj kaj unitariismo), li verkis la broŝuron *Unitariismo* (1982).

Nsumbu WA-KIBOKA (1958-1995), aktivulo en la klubo de Lukala (Zairio), ofta kontribuinto al la revuo *Afrika Reto*, mortis la 17-an de decembro.

OFICIALA INFORMILO

PATRONOJ DE TEJO 1996

Belgio: Stella De Weerd. Brazilo: Izaio Carneiro Soares; Leopoldo H. Knoedt. Luksemburgio: André Ruysschaert. Norvegio: Margrete Landmark. Usono: Dorothy Holland.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Belgio: Stella De Weerd. Danio: Emil Vaarst. Finnlando: Liisi Oterma; Meri Lehtinen. Francio: Clara Troper; René Lemaire; Raymond Boré. Germanio: Elfriede Kruse. Nederlando: Danny ten Haaf; W.C. Keizer. Norvegio: Margrete Landmark; Olav Reiersøl. Svedio: Amy Nilsson; Sten Axel Broman; Eugen Rytenberg; Inga Nothfalk; Sam Fritz.

DONACOJ 1996 (gld.)

ĝis la 31-a de marto

Fondaĵo Afriko: Finnlando: B. Eriksson 150,00. Italio: D. Trombeta 2388,00. Sumo ĉi-jara 6640,36.

Fondaĵo Ameriko: Finnlando: L. Oterma 165,83. Venezuelo: J. Bachrich 50,00. Sumo ĉi-jara 215,83.

Fondaĵo Canuto: Germanio: L. Mahn 11,00. Finnlando: B. Eriksson 100,00. Japanio (por aziaj e-istoj): H. Inumaru 62,26; M. Iwai 31,13; S. Kitagawa 99,62; Y. Misawa 94,62; M. Niwa 62,26; Y. Ootuka 62,26; Y. Sasaki 31,54; T. Taniguti 62,26. Nederlando: R. Balk 15,00; C.M. Balk-v.d. Teems 15,00; H. Meyer 21,00; P. Roether 30,00. Sumo ĉi-jara 3731,99.

Ĝenerala Kaso: Argentino: E. Balech 29,50. Britio: R.C. Hoather 20,22. Francio: R. Lemaire 221,45. Svislando: P.A. Béguin 48,27. Usono: D. Holland 38,53. Diversaj malgrandaj: 4,13. Sumo ĉi-jara 4011,23. Junulara Fondaĵo: Germanio: W. Heinrich 186,21. Sumo ĉi-jara 186,21. Triamonda Kongresa Fondaĵo: Ĉeĥio: M. Severa 16,88. Finnlando: I. Heikkilä 25,00; L. Teräntö 34,92. Germanio: W. Brandenburg 20,00; L. Mahn 11,00; H. Meyer 30,00; P. Roether 30,00. Nederlando: G.A.M. van Bergeijk 25,00. Pollando: D. Pochanke 25,00. Svislando: B. Pochanke 100,00; S. Pochanke 100,00. Sumo ĉi-jara 1955,42.

Volontula Fondaĵo: Germanio: L. Mahn 11,00; P. Roether 30,00. Sumo ĉi-jara 155,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

LA NOVA REALISMO

de Bruno Vogelmann

185 p. 19,80 gld. Pri Nova Pensado, Religieco Novstila, homaron unuiganta mondkoncepto. Premio Deguči, Premio FAME. Tradukita en 26 naciajn lingvojn. Havebla de ĉiuj libroservoj. El nepagipovaj landoj skribu al la aŭtoro, pk 1564, DE-74555 Crailsheim, Germanio.

Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

NOVA tejo-VARBILO!

tejo ĵus eldonis 8-paĝan faldfolion tre allogan, kiu informas pri la avantaĝoj membri en **tejo** kaj pri la manieroj kontribui al ĝi.


Enhavde redaktita de Thomas

Pusch, ĝi venas kun fotoj kaj grafiko de Franĉjo Veuthey, por kiu pozis brazila esperantisto, Clay Magalhães.

Dukolore presita en A6-formato (10cm. x 15cm.), grandaj literoj kaj dinamika teksto-sinsekvo.

Se vi deziras ricevi ekzemplerojn por distribuo, turnu vin al **tejo**. Nieuwe Binnenweg 176,


NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KOTIZPERANTO estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KOTIZPERANTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1996 **KOTIZPERANTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Franco	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

Retoriko rabatite ĝis junio!



Kvankam Ivo Lapenna mortis antaŭ pli ol 8 jaroj, pluraj liaj verkoj daŭre aktualas kaj prezentas gravan kulturen heredaĵon de nia lingvo.

Retoriko (3-a eld., 1971). 294p. Tole bindita. Ĉefverko de la plej bona oratoro en la historio de Esperanto, ĉiam aktuala gvidlibro por majstri la arton de la publika parolo. Prezo: 51,00 (ĝis la fino de junio 48,00) gld.*

Hamburgo en retrospektivo (2-a eld., 1977). 162p. Pri la historiaj ŝanĝoj en UEA dum la Kongreso en Hamburgo. Prezo: 33,00 gld.

Kritikaj studoj defende de Esperanto (1987). 60p (grandformata). Eseo el la jaroj 1952-1984, en kiuj la plej brila advokato de Esperanto montras kiel defendi la lingvon. Prezo: 22,80 gld.

Elektitaj paroladoj kaj prelegoj (1966). 152p. Inspiraj oratoraĵoj pri la evoluo de la E-movado en la 50-aj kaj 60-aj jaroj. Prezo: 33,00 gld.*

Memorlibro pri la Internacia Jubilea E-Konferenco, Graz 1987. Cent jaroj de Esperanto-kulturo (red. K. Perko, 1989). 168p. Inter valoraj referaĵoj (i.a. de Albault, Régulo Pérez, Boulton, Ragnarsson, Neergaard kaj Thierry) troviĝas ankaŭ la lastaj paroladoj de Lapenna kaj pluraj fotoj. Prezo: 50,70 gld.

Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo (1952). 144p. Pri la konstruado de la postmilita internacia ordo. Prezo: 33,00 (ĝis la fino de junio 27,00) gld.

Juraj terminologiaj problemoj (1987). 38p. Kun aparta konsidero pri la Esperanta terminaro. Prezo: 24,00 gld.

*Por tiuj du libroj UEA donas trionan rabaton je aĉeto de minimume 3 ekz. (por ĉiuj aliaj validas la kutima sesona rabato je aĉeto de 3 ekz). Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

Brazila E-Ligo petas al ĉiuj esperantistoj sendi salut-/gratuleter-/pk-ojn al 140 gelernantoj de E-kurso ĉe unuagrada lernejo en Braziljo, en kiu Esperanto estas ekde nun oficiale instruata. La ricevotajn pk-ojn oni poste uzos kaj en ekspozicioj kaj kiel argumenton dum kontaktoj kun la celo enkonduki Esperanton en aliajn oficialajn lernejojn, surbaze de leĝo ĵus promulgita de la Ĉambro de Deputitoj de la brazila ĉefurbo. Adreso: C.E.F.B.M., Cx. Postal 7588 – Sobradinho, Brasília (DF) – Brazilo, 73001-970.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!


FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu **patrono de TEJO**

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokkazajn servojn kaj publikigadojn.

LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EFIKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!



Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Roterdamo: UEA 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj* n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

KOMPLETIGU VIAN KOLEKTON.

Revivu historiajn momentojn de nia movado.

Mendu malnovajn numerojn de *Esperanto*.

Estas ankoraŭ haveblaj numeroj el la jenaj jarkolektoj:

1980-1991	po	1 gld.
1970-1979	"	2 gld.
1960-1969	"	3 gld.
1950-1959	"	4 gld.

Sendokostoj aldonigas.

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio



Pasintjare 270 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

En unu jaro tiu nombro preskaŭ duobliĝis. Aliĝu ankaŭ vi al la plej rapide kreskanta klubo de la Movado! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

